

IRÈNE NÉMIROVSKY

La balo



Esperantigis: M. Michel DEREYGER (Mikelo)



Irène NEMIROVSKY (1903-1942)

LA BALO (1928)

Esperantigis :

M. Michel DEREYGER (Mikelo)

Karaj geamikoj kaj fidelaj legantoj,

Kun granda plezuro, mi prezentas al vi mian tradukon de la novelo : "LE BAL" (1928), kiun france skribis Irène NEMIROVSKY (1903-1942).

Esperante, ke mi ne tro perfidis la originalan rakonton, precipe la apartan stilon de la talenta verkistino, mi deziras al vi ...

BONAN LEGADON !

Koran dankon al IVAR, PASCAL, GINETTE, JADRANKA, DOROTA kaj FILIP pro iliaj taŭgaj rimarkoj kaj amika helpo!

NB : Tiu traduko unue aperis felietone en mia blogaro en Ipernity de januaro ĝis aprilo 2014.

<http://www.ipernity.com/blog/mike59/685797>

UNUA ĈAPITRO

Sinjinorino Kampf eniris la lernoĉambron, tiom bruske malfermante la pordon malantaŭ si, ke la lustro el kristalo eksonoris, kun pura dolĉa tintilsono, per ĉiuj siaj ornamaĵoj svingitaj pro la aerblovo. Sed Antoinette ne ĉesigis sian legadon, tiom kliniĝinta sur sia pupitro, ke ŝiaj haroj tuŝis la paĝojn. Ŝia patrino silente rigardis ŝin dum momento ; kaj ŝi venis stari antaŭ ŝi, kun la brakoj krucitaj sur la brusto.

Ŝi ekkriis :

« Mia infano, vi povus moviĝi kiam vi vidas vian patrinon, ĉu ne ? Ĉu estas do via postaĵo gluita al la seĝo ? Kia nobla maniero !... Kie estas Miss Betty ? »

En la apuda ĉambro, la bruo de kudromaŝino ritmis kanzonon, iu *What shall I do, what shall I do when you'll be gone away*¹..., kiun rukulis mallerta kaj freŝa voĉo.

- Miss, venu ĉi tien ! alvokis S-ino Kampf.- Yes, Mrs. Kampf.

La malgranda anglino, kun ruĝaj vangoj kaj dolĉaj timo-plenaj okuloj, kun mielkolora tubero volvita ĉirkaŭ ŝia ronda eta kapo, enŝoviĝis tra la malfermetita pordo.

- Mi dungis vin por vartadi kaj instrui mian filinon, ĉu ne ? ... sed ne por kudri al vi robojn ! senindulge eldiris S-ino Kampf... Ĉu

Antoinette ne scias, ke ŝi stariĝu kiam eniras ŝia panjo ?- Ho ! Antoinette, how can you?² diris Miss kun ia tristigita pepado.

Tiam estis Antoinette staranta kaj mallerte balanciĝanta sur unu kruro. Ŝi estis magra longa knabino de dek kvar jaroj, kun la pala vizaĝo de tiu aĝo, tiel karnomanka, ke al plenkreskuloj ĝi aspektis kvazaŭ ronda hela makulo, sen trajtoj, kun mallevitaj laco-koloraj palpebroj kaj fermita eta buŝo... Dekkvarjara, kun la mamoj elkreskantaj sub la mallarĝa robo de lernantino, kaj kiuj vundas kaj ĝenas la malfortan infanan korpon... Kun

grandaj piedoj, kaj tiuj longaj flutoaspektaj brakoj kun ruĝaj manoj ĉe la ekstremaĵoj, fingroj inkmakulitaj, kaj kiuj fariĝos la plej belaj brakoj en la mondo, kiu scias ?.. Malforta nuko, mallongaj haroj sekaj kaj maldikaj ...

« Komprenu min, Antoinette ! Oni povus ja malesperi pro viaj manieroj, mia kompatinda filino !.. Sidiĝu. Mi denove eniros, kaj vi faros al mi tiun plezuron tuj stariĝi, ĉu vi aŭdis ? »

S-ino Kampf retroiris kelkajn paŝojn kaj duafoje malfermis la pordon. Antoinette malrapide stariĝis kun tiom okulfrapa rifuzemo, ke ŝia patrino vigle demandis, kun premitaj lipoj kaj minaca mieno :

- Ĉu tio hazarde ĝenas vin, fraŭlino ?

- Ne, panjo, mallaŭte respondis Antoinette.- Do, kial vi montras tian mienon ?

Antoinette ridetis per ia malkuraĝa kaj peniga klopodo, kiu dolore misformis ŝiajn trajtojn. Fojfoje, ŝi tiom malamis la plenkreskulojn, ke ŝi volus mortigi ilin, kripligi ilian vizaĝon, aŭ piedfrapante ekkrii : « Ne ! Vi tedas min ! » ; sed ŝi timis siajn gepatrojn ekde la fruinfanaĝo. Iam, kiam Antoinette estis pli malgranda, ŝia patrino ofte prenis ŝin sur la genuojn, kontraŭ sian bruston ; ŝi karesis kaj kisetis ŝin. Sed tion forgesis Antoinette. Dum plej profunde en si mem ŝi konservis la sonojn, la voĉeksplozojn pro kolerego, kiuj pasis super ŝian kapon, « tiu etulo, kiu senĉese ĝenas min !.. » , « vi denove makulis mian robon per viaj malpuraj ŝuoj ! ek en la angulon ! tio instruos vin, ĉu vi aŭdis ? eta stultulino ! » kaj iun tagon... por la unua fojo, tiun tagon ŝi deziris morti... sur stratangulo, dum sceno, tiun furiozan frazon, tiom forte kriitan, ke pasantoj rigardis returne : « Ĉu

vi ja volas vangofrapon ? » kaj la brulvundon de la frapo... Stratmeze... Ŝi havis dek unu jarojn kaj estis altkreska rilate sian aĝon... La pasantoj, la plenkreskuloj, tio ne gravis... Sed ĝuste tiam, knaboj estis elirantaj el la lernejo kaj ekridis rigardante ŝin : « Nu ! la piĉulin' ! » Ho ! tiu mokrido, kiu sekvis ŝin dum ŝi plu iris, kun mallevita kapo, sur la nigra aŭtuna strato... dancadis la lumoj tra ŝiaj larmoj.

« Nu ! Vi ĉesos plorgrimaci, ĉu?.. Ho ! kia aĉa karaktero !.. Kiam mi punbatas vin, tio estas por via bono, ĉu ne ?.. Kaj, ne rekomencu inciti min, tion mi konsilas al vi !.. » Kiaj aĉaj homoj ! .. Kaj ankoraŭ nun, oni intence krueblas kontraŭ ŝi de mateno ĝis vespero, por turmenti, torturi kaj

humiligi ŝin : « Kiel do vi tenas vian forketon ? » (Dio mia ! antaŭ la domservisto !) « kaj sidiĝu rekte. Almenaŭ, ne ŝajnigu vin ĝiba ! » Ŝi estis dekkvarjara, ŝi estis junulino, kaj en siaj sonĝoj, amata kaj bela virino... Viroj karesis ŝin, admiris ŝin, kiel en la libroj Andrea Spirelli³ karesas Elena-n* kaj Maria-n*, kaj Julien de Suberceaux⁴, Maud-on de Rouvres*... Amo !..

Ŝi ektremis. S-ino Kampf finis :

« Kaj se vi kredas, ke mi pagas al vi anglinon, por ke vi havu tiajn manierojn, vi eraras, mia etulin' ! »

Pli mallaŭte, dum ŝi relevis harfasketon, kiu strekis la fronton de ŝia filino :

« Vi daŭre forgesas, ke ni estas nun riĉaj, Antoinette ! ..» ŝi diris.

Ŝi turnis sin al la anglino :

- Miss, vi devos fari por mi multe da aĉetoj ĉi-semajne... Mi aranĝos balon la 15an...

- Balon !? flustris Antoinette, kun larĝe malfermitaj okuloj.

- Jes ja, ridetante respondis S-ino Kampf.

Ŝi rigardis Antoinette-n kun orgojla esprimo, kaj, kuntirante la brovojn, ŝi kaŝe fingromontris la anglinon.

- Ja nenion vi diris al ŝi, ĉu ne ?

- Ne, panjo, ne, vigle respondis Antoinette.

Ŝi konis tiun ĉi daŭran kaj absorban zorgon de sia patrino. En la komenco, tio okazis du jarojn antaŭe, kiam ili estis forlasintaj la malnovan straton Favart⁵, post la geniaj borsospekuladoj de Alfred Kampf, okaze de la malplialtigoj unue de la franko kaj poste de la sterlingo en 1926, kiuj donis al ili la riĉecon. Ĉiumatene, Antoinette estis alvokita en la dormoĉambron de siaj gepatroj. Ŝia patrino estis ankoraŭ en la lito, glatigante siajn ungojn. En la apuda tualetejo, ŝia patro, malgranda magra judo kun ardaĵ okuloj, sin razis, lavis kaj vestis per tiu freneza rapideco de ĉiuj gestoj, pro kiu iam moknomis lin « Feuer » ⁶ liaj kamaradoj, la germanaj judoj de la Borso. Tie, sur tiuj grandaj ŝtupoj de la Borso, li estis

stamfinta dum jaroj ... Antoinette sciis , ke antaŭe, li estis oficisto en la Banko de Parizo, kaj, pli frue en la pasinteco, simpla servisto en blua livreo ĉe la pordo de la banko... Iom antaŭ la naskiĝo de Antoinette, li estis edziĝinta kun sia amorantino, Fraŭlino Rosine, la tajpistino de sia mastro. Dum dek unu jaroj, ili estis loĝintaj en eta nigra apartamento, malantaŭ la Opéra-Comique⁷. Antoinette memoris kiel ŝi vespere kopiis siajn taskojn, sur la tablo de la manĝoĉambro, dum la servistino bruege lavis la manĝilaron en la kuirejo ; dume S-ino Kampf legis romanon, kubutapogita sub la lampo, iu dika pendolampo kun globo el malpolurita glaso, kie lumis la vigla gasoŝpruco. Kelkfoje, S-ino Kampf ellasis profundan incitan sopiron, tiom forte, tiom subite, ke Antoinette eksaltis sur sia seĝo. Kampf demandis : « Nu, kio trafas vin ? » kaj Rosine respondis : « Naŭzas min tiu penso, ke estas homoj, kiuj vivas komforte kaj estas feliĉaj, dum mi mem pasigas la plej bonajn jarojn de mia vivo en tiu aĉa loko, fliktante viajn ŝtrumpetojn !.. »

Kampf ŝultrumis sed silentis. Tiam Rosine plejofte turnis sin al Antoinette. « Kaj kial do vi aŭskultas ? Ĉu ja koncernas vin tio, kion diras la plenkreskuloj ? » ŝi kolere ekkriis. Kaj ŝi plu diris : « Jes, nu, mia filino, se vi atendas ĝis via patro riĉiĝos, kiel li promesas ekde nia geedziĝo, vi povas ja atendi ĉar fluos ankoraŭ multe da akvo sub la ponto... Restante ĉi tie vi kreskos, por daŭre atendi same kiel via kompatinda patrino... » Kaj kiam ŝi eldiris la vorton « atendi », sur ŝiajn malmolajn, streĉajn kaj malgajajn trajtojn, pasis ia profunda kaj patosa esprimo, kiu kortuŝis Antoinette-n kontraŭvole, tial ke ŝi ofte instinkte prezentis siajn lipojn al la patrina vizaĝo.

« Mia kompatinda etulino », diris Rosine karesante al ŝi la frunton. Sed unu fojon, ŝi ekkriis : « Ha, lasu min trankvila, vi ĝenas min ! Ankaŭ vi estas ja tedulo ! », kaj neniam plu Antoinette donis al ŝi aliajn kisojn ol la matenajn aŭ vesperajn, kiujn gepatroj kaj infanoj povas maŝine interŝanĝi, same kiel manpremoj inter du nekonatuloj.

Kaj iam, ili subite fariĝis riĉuloj - ŝi neniam bone komprenis kiel. Ili venis loĝi en granda blanka apartamento, kaj ŝia patrino tinkturiĝis al si la harojn per bela orkoloro tute nova. Antoinette ĵetis timan rigardon al tiu flama hararo, kiun ŝi ne rekonis.

- Nu, Antoinette, ordonis S-ino Kampf, rediru al mi : Kion vi respondas, kiam oni demandas al vi, kie ni loĝis lastan jaron ? - Vi estas stulta ! diris Kampf el la apuda ĉambro. Kiu do parolus al la etulino ? Ŝi konas nenion.

- Mi scias, kion mi diras ! pli laŭtvoĉe respondis S-ino Kampf. Kio pri la domservistoj ?

- Se mi vidos ŝin diri al ili eĉ unu vorton, mi mem traktos tion ; ĉu vi aŭdis Antoinette ? Ŝi ja scias, ke ŝi devas silenti kaj lerni siajn lecionojn... kaj punkto. Oni demandas de ŝi nenion ajn...

Kaj turnante sin al sia edzino :

- Ŝi ne estas stultulino, sciu.

Sed, ekde ŝia edzo estis foririnta, S-ino Kampf daŭris :

« Se iu demandos ion al vi, Antoinette, vi diros, ke ni loĝis tutjare en Sud-Francio... Vi ne bezonos klarigi ĉu temas pri Cannes aŭ Nico, diru nur en Sud-Francio... krom se oni demandas al vi ; tiukaze, preferinde diru Cannes, tio estas pli eleganta... Sed kompreneble, pravas via patro : precipe vi silentu. Knabineto devas kiel eble malplej paroli kun plenkreskuloj. »

Kaj ŝi forpelis ŝin per granda signo de sia bela nuda brako iom dikigita, kie lumis la brakringo kun diamantoj, kiun ŝia edzo estis ĵus donacinta al ŝi, kaj kiun ŝi forlasis nur por sin bani. Antoinette neprecize memoris pri ĉio tio, dum ŝia patrino demandis al la anglino :

- Ĉu Antoinette havas almenaŭ belan skribmanieron ? - Yes, Mrs. Kampf.

- Kial ? timeme demandis Antoinette.

- Ĉar vi povos helpi min, klarigis S-ino Kampf. Ĉivespere mi preparos miajn kovertojn... Mi sendos ĉirkaŭ ducent invitkartojn, ĉu vi komprenas ? Mi ne povos elturniĝi sola. Miss Betty, mi permesas, ke hodiaŭ Antoinette enlitiĝu unu horon pli malfrue ol kutime... Mi esperas, ke vi estas kontenta, ĉu ? ŝi demandis, turnante sin al sia filino.

Sed, ĉar Antoinette silentis, denove enprofundiĝinta en siaj sonĝoj, S-ino Kampf levis la ŝultrojn.

« Tiu etulino ĉiam enreviĝas ! ŝi mezvoĉe komentis. Balo ! Ĉu vi ne fieras, je la penso, ke viaj gepatroj donos balon ? Vi ne havas multe da koro,

tion mi timas, mia kompatinda filino », ŝi sopire aldonis forirante.

DUA ĈAPITRO

Tiun vesperon, Antoinette, kiun la anglino kutime enlitigis akurate je la naŭa, restis en la salono kun siaj gepatroj. Tiom malofte ŝi eniris tien, ke ŝi atente rigardis la blankajn lignotegaĵojn kaj origitajn meblojn, kvazaŭ ŝi enirus fremdan domon. Ŝia patrino montris unupiedan tableton, kie kuŝis inkujo, plumoj kaj paketo da karto kaj kovertoj.

- Sidiĝu ĉi tie. Mi tuj diktos al vi la adresojn.

« Ĉu Vi venu ĉi tien, kara amiko mia ? » ŝi laŭte diris, sin turnante al sia edzo, ĉar en la apuda ĉambro la domservisto estis foriganta la manĝilaron kaj, de pluraj monatoj, la gesinjoroj Kampf parolas inter si per Vi, kiam li ĉeestis.

Kiam S-ro Kampf sufiĉe alproksimiĝis, Rosine flustris : « Nu ! Forpelu tiun lakeaĉon, bonvolu... Li ĝenas min... »

Tiam, ekvidinte la rigardon de Antoinette, ŝi ruĝiĝis kaj vigle ordonis :

« Nu, Georgo ! Ĉu vi baldaŭ finos ? Flanken metu ĉion, kio restas kaj mi permesas, ke vi supreniru... »

Poste, ĉiuj tri silentadis, rigidigitaj sur siaj seĝoj. Kiam la domestro estis foririnta, S-ino Kampf eligis sopiron.

- Finfine ! Mi ne scias kial, sed mi malŝatas tiun Georgon ! Kiam li surtabligas kaj estas malantaŭ mi, li perdigas al mi la apetiton... Kial vi stulte ridetas, Antoinette ? ... Nu ! Ek al la laboro ! Alfredo, vi havas la invitliston, ĉu ?

- Jes, diris Kampf. Sed atendu : mi unue demetu la jakon ĉar varmas.- Nepras, ke vi ne forgesu ĝin ĉi tie, kiel okazis lastan fojon, diris lia edzino... Mi ja rimarkis laŭ iliaj mienoj, ke Georgo kaj Lucia opinias strange, ke ni restas ĉemizvestite en la salono.- Mi fajfas pri la opinio de la servistaro, grumbletis Kampf.- Vi ja malpravas, amiko mia, ĉar ili faras bonfamojn

irante de laborloko al alia kaj babilante... Mi neniam estus sciinta, ke la baronino de la tria ...

Ŝi mallaŭtis sian voĉon kaj murmuris kelkajn vortojn, kiujn Antoinette ne sukcesis aŭdi malgraŭ siaj streboj.

- ... sen Lucia, kiu laboris tri jarojn en ŝia domo...

El sia poŝo, Kampf eltiris paperon, per nomoj kovritan kaj tute forstrekitan.

- Ni komencu per homoj, kiujn mi konas, ĉu ne, Rosine ? Skribu, Antoinette :

Gesinjoroj Banyuls. Ties adreson, mi ne konas. Vi havas la adresaron ĉemane; vi laŭvice serĉos...

- Ili estas tre riĉaj, ĉu ne ? respektu flustris Rosine.- Tre.

- Ĉu ... vi opinias, ke ili volonte venos ? Mi ne konas S-inon Banyuls.- Ankaŭ ne mi. Sed mi rilatas kun la edzo por negocoj, tio sufiĉas... Laŭdire, lia edzino estas ĉarma, kaj oni ne ofte ricevas ŝin en ŝia societo, de kiam ŝi estis implikita en tiu afero... vi scias, tiuj famaj seksdiboĉadoj de la Bois de Boulogne⁸, antaŭ du jaroj...- Nu, Alfredo ! la etulino... !

- Sed ŝi ja ne komprenas. Skribu, Antoinette...Tamen, ŝi estas tre valora virino, por komenci...

- Ne forgesu la Ostier-ojn, vigle diris Rosine. Laŭdire, ili aranĝas belegajn festojn...

- S-ro kaj S-ino Ostier d'Arrachon, kun du r, Antoinette... Pri tiuj, mi ne certas, kara mia. Ili estas vere prudegaj, tre... La virino iam estis...

Li gestis.

- Ne ?!

- Jes ja ! Mi konas iun, kiu antaŭe en Marseljo ofte vidis ŝin en ĉiesulinejo... Jes ja ! Tion mi certigas al vi... Sed tio okazis antaŭ longe, preskaŭ dudek jaroj. Ŝia edziniĝo tute senkotigis ŝin ; ŝi akceptas tre valorajn homojn ; ŝi estas ege postulema koncerne siajn rilatojn... Ĝenerale, ĉiuj virinoj, kiuj multe diboĉis, fariĝas tia post dek jaroj... - Dio mia ! sopiris S-ino Kampf. Kiel malfacile !...- Ni estu metodaj, kara mia... Por la

unua monduma kunveno invitu homojn, multajn homojn kaj pliajn homojn, kiel eble plej multaj...

Nur por la dua aŭ la tria ni selektos... Ĉifoje ni invitu abunde !.. - Nu tamen, se ni almenaŭ certus, ke ĉiuj venos... Se iuj homoj malkonsentos veni, mi kredas, ke mi mortos pro honto...

Kampf silente kaj grimace ridetis.

- Se iuj homoj malkonsentos veni, vi denove invitu ilin por la venonta fojo, kaj denove por la sekva fojo... Ĉu vi volas mian opinion ? Fakte, por antaŭeniri en la alta societo, necesas nur sekvi laŭlitere la Evangelimoralon ...

- Kio ?

- Se oni vangfrapas vin, prezentu la alian vangon... La societo estas la plej bona lernejo al kristana humileco.

- Mi demandas al mi, kie vi serĉas tiajn stultaĵojn, amiko mia, diris S-ino Kampf, svage ŝokata.

Kampf ridetis.

- Nu, ni daŭru... Jen kelkaj adresoj sur tiu papereto, kiujn vi nur rekopiu, Antoinette...

S-ino Kampf kliniĝis super la ŝultrojn de sia filino, kiu plu skribis sen levi la frunton :

- Estas vere, ke ŝi havas beletan legeblan skribon... Nu, Alfredo, ĉu ne S-ro Julien Nassan estas tiu viro, kiu estis enprizonigita pro iu friponaĵafero ?..

- Ĉu Nassan ? Jes ja.

- Ha ! murmuris S-ino Kampf kun iom da miro.

Kampf diris :

- Sed el kie vi ja venas ? Li estis rehonorigita ; oni lin ĉie akceptas. Li estas ĉarma fraŭlo kaj precipe unuaranga aferisto...- S-ro Nassan, 23 bis Avenue Hoche⁹, relegis Antoinette. Kaj poste, Paĉjo ?

- Estas nur dudek kvin, veadis S-ino Kampf ; ni neniam eltrovos ducent personojn, Alfredo...

- Sed jes ja ! Ne komencu ekscitiĝi. Kie estas *via* listo ? Ĉiuj personoj, kiujn vi ekkonis lastan jaron en Nico, Deauville, Chamonix... [10](#)

S-ino Kampf prenis notblokon sur la tablo.

- Grafo Moïssi ; gesinjoroj kaj fraŭlino Lévy de Brunelleschi kaj markizo d'Itcharra : li estas la ĝigolo de S-ino Lévy, oni ĉiam akceptas ilin kune...

- Tamen ekzistas edzo, ĉu ? dubamiene demandis Kampf. - Kompreneble, ili estas tre distingitaj homoj... Estas pliaj markizoj, sciu ! Jen kvin : markizo de Liguès y Hermosa, markizo... Diru, Alfredo, ĉu oni parolante aldonu ilian titolon ?.. Mi opinias, ke pli valoras, ĉu ne ? Kompreneble, ne « Sinjoro markizo » kiel dirus la domservistoj, sed « kara markizo, mia kara grafino »... sen tio, la aliuloj eĉ ne ekkonscius, ke ni akceptas titolulojn...- Nu, se ni povus surdorsen glui ilian etikedon, tio plaĉus al vi, ĉu ne ?- Ho ! Kiaj stultaj ŝercoj !... Nu, Antoinette, rapidu por kopii ĉion tion, mia filineto...

Antoinette skribis dum momento, poste ŝi laŭtlegis :

« Barono kaj baronino Levinstein-Lévy, grafo kaj grafino du Poirier...[11](#)
»

- Ili estas Abraham kaj Rebecca Birnbaum.[11](#) Ili aĉetis tiun titolon ; estas ja stulte nomiĝi du Poirier, ĉu ne? Nu, mi mem povus ja

Ŝi enprofundiĝis en sonĝon.

- Simple : grafo kaj grafino Kampf, ŝi flustris. Tio belsonas. - Nu, iom atendu, konsilis Kampf. Ne antaŭ dek jaroj.

Dume, Rosine elektis vizitkartojn senorde ĵetintajn en pokalo el malakito ornamita per ĉinaj drakoj el origita bronzo.

- Tamen, mi ja dezirus scii, kiuj estas ĉiuj tiuj homoj, ŝi murmuris. Temas pri aro da kartoj, kiujn mi ricevis okaze de la novjaro... Enestas multaj el ĝigoloj, kiujn mi ekkonis en Deauville...- Ni bezonas kiel eble plej da homoj; do, ili taŭgos, se dece vestitaj ...- Ho, vi ŝercas, kara mia ! Ili ĉiuj estas grafoj, markizoj aŭ almenaŭ vicgrafoj... Sed mi ne sukcesas kunmeti

nomojn kaj vizaĝojn... ili ĉiuj similas. Tamen, fakte tio ne gravas; vi ja bone komprenis, kiel elturniĝis la Rothwan de Fiesque okaze de sia kunveno, ĉu ne? Al ĉiuj oni diras ĉiam la saman frazon : « Mi estas tiom feliĉa... », kaj se oni estas devigata prezenti unu personon al alia, oni balbutas la nomojn : neniu povas ion aŭdi ... Prenu, Antoinette, mia etulino : jen facila tasko ĉar ĉiuj adresoj estas skribitaj sur la kartoĵoj...- Sed Panjo ! interrompis Antoinette. Tio estas la karto de la tapetisto...

- Kion vi diras ? ... Montru al mi !.. Jes, ŝi pravas. Dio mia ! mi perdas la kapon, tion mi asertas, Alfredo !.. Kiom vi havas nun, Antoinette ?- Cent sepdek du, Panjo.

- Ha ! Spite ĉion ! ...

La gesinjoroj Kampf elspiris pro kontento, kaj ridetante rigardis unu la alian, kvazaŭ du rolantoj sur sceno post tria revoka aplaŭdo, kun miksa esprimo de feliĉa laceco kaj triumfo.

- Nia afero ne iras malglate, ĉu ?

Antoinette timeme demandis :

- Ĉu... ĉu tiu fraŭlino Izabela Koset, estas « mia » Izabela ? - Nu... jes ja...

- Ho ! Kial do vi invitas ŝin ? ekkriis Antoinette.

Ŝi tuj forte ruĝiĝis, antaŭvidante la sekvan : « Ĉu tio koncernas vin? » de sia patrino. Sed S-ino Kampf klarigis kun ia konfuzo :- Ŝi estas tre bona fraŭlino... Oni devas plezurigi homojn...- Ŝi estas malbonega kiel skabio, protestis Antoinette.

Fraŭlino Izabela, kuzino de la gesinjoroj Kampf, instruistino de muziko ĉe pluraj familioj de riĉaj judaj makleristoj, estis platbrusta maljuna fraŭlino rekta kaj rigida kiel pluvombrelo. Al Antoinette, ŝi instruis pianon kaj solfeĝon. Ege miopa, sed neniam surhavante nazumon pro vantemo rilate al siaj sufiĉe belaj okuloj kaj densaj brovoj, ŝi alproksimigis al la partituroj sian longan karnodikan pintan nazon, blua pro tualetpudro, kaj tuj kiam Antoinette eraris, ŝi vigle batis ŝiajn fingrojn per liniilo el ebena tiel plata kaj malmola kiel ŝi. Ŝi estis malbonintenca kaj traserĉema kiel maljuna pigo. La antaŭtagon de la kursoj, Antoinette fervore murmuris en sia vesperpreĝo (ĉar ŝia patro konvertiĝis samepoke de sia edziĝo, Antoinette

estis edukata en la katolika religio) : « Dio mia, faru, ke Izabela mortos ĉi-nokte ! »

- La etulino pravas, rimarkis Kampf kun surprizo. Kio okazas al vi por inviti tiun maljunan frenezulinon ? Vi ja ne toleras ŝin...

S-ino Kampf kolere ŝultrumis :

- Ha ! Nenion vi komprenas !.. Kiel do la familio povus tion ekscii alimaniere ? Nu ! imagu la mienon de onklino Loridon, kiu malamikiĝis ĉar mi edziniĝis kun Judo ; kaj ankaŭ tiun de Julie Lacombe, de onklo Martial kaj de ĉiuj familianoj, kiuj parolis kun ni per ia protektvoĉtono ĉar ili estas pli riĉaj ol ni ; vi ja memoras, ĉu ? Nu, estas ja simple : se ni ne invitos Izabelan, se mi ne scios, ke la postan tagon ili ĉiuj krevos pro tro da ĵaluzo, tiukaze mi preferas tute ne doni balon ! Antoinette, skribu !

- Ĉu oni dancos en niaj du salonoj ?

- Kompreneble, kaj ankaŭ en la galerio... vi ja scias, ke nia galerio estas belega... ni luprenos multajn korbojn da floroj ; vi vidos, kiel tio belos en la granda galerio : ĉiuj tiuj virinoj kun tualetoj kaj juveloj, ĉiuj viroj kun frakoj ... Ĉe la Lévy de Brunelleschi, estis mirinde bela spektaklo. Dum la tangoj, oni malŝaltis la elektron kaj lasis ŝaltitaj en la anguloj nur du alabastrajn lampegojn kun ruĝa lumo... - Ho, tion mi ne tre ŝatas ; tio ŝajnas kvazaŭ dancejo.- Ba ! Laŭdire, tion oni faras ĉie nuntempe. La virinoj ŝategas lasi sin muzike fuŝpalpadi ... Kompreneble, oni vespermanĝos sur etaj tabloj...- Ĉu eble bufedo por komenci ?..

- Jen bona ideo... Necesas vigligi ilin tuj je alveno. Ni povus aranĝi bufedon en la ĉambro de Antoinette. Tiun nuran nokton, ŝi dormus en la tolaĵejo aŭ en la eta formetejo ĉe la koridorfino...

Antoinette fortege ektemis. Ege paliĝinte, ŝi murmuris per premsufokita voĉo :

- Ĉu mi ne povos resti eĉ etan kvaronhoron ?

Balo... Dio mia ! ĉu eblus, ke okazus tuj apud ŝi tia mirindaĵo, kiun ŝi svage imagis kiel konfuza miksado de freneza muziko, ebriegaj parfumoj, lumegaj tualetoj... de amsopiraj paroloj flustritaj en aparta buduaro malvarmeta kaj malluma kiel alkovo... kaj ŝi estus enlitigita same kiel ĉiu-vespere, je la naŭa, kvazaŭ bebo... Eble viroj, kiuj sciis, ke la gesinjoroj

Kampf havas filinon, demandus kie ŝi estas ; kaj ŝia patrino respondus kun abomena eta rido : « Ho ! de longe ŝi jam dormas, kompreneble !.. » Kaj tamen, ĉu ja tiom gravis por ŝi, ke ankaŭ Antoinette ekhavu sian parton da feliĉo sur tiu terglobo ?.. Ho ! Dio mia ! danci unu fojon, unu nuran fojon, kun beleta robo, kiel vera fraŭlino, ĉirkaŭpremita de virbrakoj... Ŝi rediris kun ia senespera aŭdaco, fermante la okulojn, kvazaŭ ŝi premus ŝargitan revolveron kontraŭ sia brusto :

- Nu, Panjo, nur unu etan kvaronhoron ? - Kio ? kriis S-ino Kampf kun konsterno. Nur rediru tion !..- Vi iros al la balo de S-ro Blanko, diris la patro.

S-ino Kampf ŝultrumis :

- Ja vere, mi opinias, ke tiu infano estas freneza...

Antoinette abrupte kriis kun emociega mieno :

- Mi petegas vin, Panjo ! Mi petegas vin... Mi havas dek kvar jarojn, Panjo ; mi ne estas plu knabineto... mi scias, ke oni eniras la societon dekkvinjare ; mi aspektas dekkvinjara kaj venontan jaron...

S-ino Kampf subite ekkriegis :

- Nekredeble ! Nu, kiel impertinenta ! ŝi kriegis per voĉo raŭkigita pro kolero. Tiu bubino, tiu nazmukulino deziras ĉeesti balon ! Ĉu vere ?... Nu, iom atendu, kaj mi deprenos de vi tiujn altajn ideojn, mia filino... Ha ! vi opinias, ke vi eniros la « societon » venontan jaron, ĉu ? Kio do enkapigis al vi tiajn pensojn ?.. Eksciu, etulino, ke nur komencas vivi MI ; ĉu vi aŭdis ? MI ! ... kaj mi tute ne intencas baldaŭ ĝeniĝi de edziniĝenda filino !.. Mi ne scias, kio min malhelpas tiri al vi la orelojn, por ke vi ŝanĝu opinion, ŝi samtone daŭris, farante movon cele al Antoinette.

Antoinette retropaŝis kaj pli paliĝis. Delira kaj senespera esprimo en ŝiaj okuloj trafis Kampf-on, kiu sentis ian kompaton.

- Nu, lasu ŝin, li diris haltigante la levatan manon de Rosine : tiu etulino estas laca kaj ekscitita ; ŝi ne scias, kion ŝi diras... iru enlitiĝi, Antoinette.

Antoinette ne moviĝis ; ŝia patrino ŝultre puŝetis ŝin :

- Nu, ekiru ! Kaj ne respondu !.. Foriru aŭ timu...

Antoinette tremis de ĉiuj siaj membroj, sed sen eĉ unu larmo ŝi malrapide eliris.

- Ĉarme, ĉu ne? Tio misaŭguras ! diris S-ino Kampf post kiam Antoinette estis elirinta. Cetere, samaĝe mi tute similis al ŝi ; sed mi malsamas mian kompatindan panjon, kiu neniam sukcesis rifuzi ion ajn al mi... Sed kredu min : mi obeigos ŝin !..- Ŝia dormado neniigos ĉion ; ŝi estis laca : jam estas la dekunua. Ŝi ne kutimas enlitiĝi tiel malfrue : ja tio verŝajne ekscitis ŝin... Ni daŭrigu la liston ; estas pli interese, diris Kampf.

TRIA ĈAPITRO

Meze de la nokto, Miss Betty estis vekita de plorĝemoj en la apuda dormoĉambro. Ŝaltinte la elektron, dum momento ŝi aŭskultis tra la muro. Estis la unua fojo, ke ŝi aŭdis la etulinon ploranta ; kiam skoldis S-ino Kampf, Antoinette kutime sukcesis regluti siajn larmojn kaj silenti.

- What's the matter with you, child? Are you ill?¹² demandis la anglino.

Tuj ĉesis la plorĝemoj.

- Via patrino skoldis vin ; mi supozas, ke tio estas por via bono, Antoinette... morgaŭ vi petos pardonon kaj post interkizado ĉio solviĝos ; sed en tiu horo, necesas dormi. Ĉu vi volas tason da varma tilio ? Ne ? Vi povus almenaŭ respondi al mi, karulino, ŝi findiris ĉar Antoinette daŭre silentis. Oh dear, oh dear!¹³ Estas ja malbele, kiam paŭtas knabineto ; vi ĉagrenas vian gardanĝelon...

Antoinette grimacis : « Anglinaĉo ! », kaj streĉis siajn malfortajn kunpremitajn pugnoj al la muro. Aĉaj egoistoj, ĉiuj hipokrituloj, ĉiuj... Ili tute fajfis pri tio, ke ŝi sufokas pro persista plorado, tute sola en la tenebro... ke ŝi sentas sin senvalora kaj sola kvazaŭ perdita hundo...

Neniu amis ŝin, neniu ajn animo en la tuta mondo... Sed ili ja ne vidis, tiuj blindaj stultuloj, ke ŝi estas miloble pli inteligenta, pli altvalora, pli profunda ol ĉiuj ili, tiuj homoj, kiuj volas eduki kaj instrui ŝin... Krudaj, senkulturaj novriĉuloj... Ha ! kiom ŝi ilin primokis tiun tutan vesperon, kaj kompreneble, ili nenion rimarkis... ŝi povis plori aŭ ridi sub ilia rigardo, ili degnis vidi nenion... dekkvarjara infano, knabineto, estas io malestiminda kaj malgrava kiel hundo... kiarajte ili forpelis ŝin enlitiĝi kaj insultis ?...

« Ha ! Mi dezirus, ke ili mortu. » Malantaŭ la muro, oni aŭdis la anglinon, kiu dormante dolĉe spiris. Denove Antoinette ekploris, sed pli mallaŭte, gustumante la larmojn, kiuj fluis sur la anguloj de ŝia buŝo kaj ene de la lipoj ; subite, plenigis ŝin stranga plezuro; por la unua fojo en ŝia vivo, ŝi tiele ploris, sen ia grimaco nek singulto, silente, kiel virino... Pli poste, ŝi

iam ploros la samajn larmojn pro amo... Dum longa tempo, ŝi aŭskultis la plorĝemojn, kiuj ruliĝis en ŝia brusto, kvazaŭ ia profunda kaj malalta hulo sur la maro... malsekigita de la larmoj, ŝia buŝo havis guston de salo kaj akvo... Ŝi ŝaltis la lampon kaj scivoleme rigardis en sian spegulon. Ŝi havis ŝvelintajn palpebrojn, ruĝajn kaj kvazaŭ marmorumitajn vangojn... Ŝi samaspektis batitan knabinecon... Malbela ! ŝi estis malbela !.. Denove ŝi singultis.

« Mi dezirus morti, Dio mia ! faru, ke mi mortos... Dio mia, bona Santa Virgulino, kial vi igis min naskiĝi inter ili ? Punu ilin, mi petegas vin... Punu ilin unu fojon, kaj poste mi bonvolos morti... »

Ŝi ĉesis kaj subite laŭtvoĉe diris :

« Verŝajne, ĉio estas nur blagoj, la bona Dio, la Virgulino, blagoj same kiel la bonaj gepatroj en la libroj, kaj ankaŭ la feliĉa aĝo... »

Ha, jes ja ! La feliĉa aĝo ! Kia blago, nu, kia blago ! Mordante tiom forte siajn manojn, ke ŝi sentis ilin sangi sub siaj dentoj, ŝi kolerege rediris :

« Feliĉa... feliĉa... Mi preferus esti senviva en la fundo de la tero... »

Sklaveco, mallibereco... en la sama horo tagon post tago devi refari la samajn gestojn... Ellitiĝi, vestiĝi... la etaj malhelaj roboj, dikaj botetoj malfajnaj ŝtrumpoj : intence, intence kvazaŭ livreo, por ke sur la strato neniu eĉ mallonge okulsekvu tiun senvaloran knabinaĉon, kiu pasas... Stultuloj ! vi neniam plu vidos tiun florkarnon, tiujn glatajn sendifektajn, freŝajn kaj lac-kolorajn palpebrojn, nek tiujn belajn timigitajn impertinentajn okulojn, kiuj alvokas, ignoras, atendas... Neniam, neniam plu... Atendi... kun tiuj malbonaj deziroj... Kial tiu hontinda kaj senespera envio, kiu ronĝas la koron, kiam ŝi ekvidas en la krepusko du amantojn, kiuj paŝante kisas sin kaj dolĉe ŝanceliĝas, kiel ebriuloj ?.. Ĉu malamo de maljuna fraŭlino, je dek kvar jaroj ? Ŝi ja scias, ke ŝi havos sian parton ; sed tio daŭras tiel longe, tio neniam okazos, kaj, dum la atendo tiu strikta humiliga vivo, kun la lecionoj, la senindulga disciplino kaj la patrino, kiu kriegas...

« Tiu virino ! tiu virino, kiu aŭdacis minaci min ! »

Ŝi intence laŭtvoĉe diris :

« Ŝi ne aŭdacintus... »

Sed ŝi memoris la levitan manon.

« Se ŝi tuŝintus min, mi estus ŝin ungovundinta aŭ mordinta... kaj... oni povas ĉiam forkuri... kaj por ĉiam... la fenestro... », ŝi maltrankvile pripensis.

Kaj ŝi imagis sin kuŝanta sur la trotuaro kaj sangomakulita... Ne okazus balo la dekkvinan... Oni dirus : « Ĉu tiu etulino ne povintus elekti alian tagon por mortigi sin... ?! » Ĉar ŝia patrino diris : « Mi ja volas vivi... mi ! mi... ! » Eble, tio fakte eĉ pli doloris ol la cetero... Neniam Antoinette vidis en la patrinaj okuloj tian malvarman rigardon de virino, de malamikino...

« Kiaj aĉaj egoistoj ! Estas mi, kiu volas vivi ! Mi ! Mi, kiu estas juna ! Mi !.. Ili min priŝtelas ; mian parton da feliĉo sur tiu tero ili ŝtelas de mi ... Ho ! Mirakle eniri en tiun balon, kaj esti la plej bela, la plej brila, kun la viroj sub miaj piedoj !.. »

Ŝi flustris :

« Ĉu vi konas ŝin ? Ŝi estas Fraŭlino Kampf ! Eble, ŝi ne estas regule beleta, nu, sed ŝi havas eksterordinaran ĉarmon... kaj ŝi estas tiel lerta... ŝi eklipsas ĉiujn aliajn virinojn, ĉu ne ? Koncerne ŝian patrinon, tiu ĉi aspektas kiel kuiristino kompare kun ŝi... »

Ŝi metis sian kapon sur la kapkusenon trempitan de larmoj kaj fermis la okulojn ; ia speco de mola kaj loza volupto dolĉe malstreĉis ŝiajn lacajn membrojn. Ŝi tuŝetis sian korpon tra la ĉemizo per etpezaj fingroj, tenere, respektoplene... Bela korpo preparita por l'amoro... Ŝi murmuris :

« Dekkvinjara... O ! Romeo, la aĝo de Julieta... »

Kiam ŝi aĝos dek kvin jarojn, la mondo malsame gustos.

KVARA ĈAPITRO

La postan tagon, S-ino Kampf ne parolis kun Antoinette pri la antaŭvespera sceno ; sed dum la tuta matenmanĝotempo, ŝi strebis sentigi sian malbonhumoron al sia filino per vico da mallongaj admonoj, kiujn ŝi primajstris kiam ŝi koleris.

- Pri kio vi sonĝas, kun tiu pendanta lipo? Fermu la buŝon kaj spiru per la nazo. Kiel agrable por la gepatroj estas filino, kiu ĉiam mense forvagas !.. Atentu ! Kiel do vi manĝas ? Mi vetas, ke vi makulis la tablotukon... Ĉu vi ne povas dece manĝi, je via aĝo ? Kaj mi petas, ke vi ne movu viajn naztruojn, mia filino... lernu aŭskulti la rimarkojn sen tiele paŭti... Ĉu vi ne degnas respondi ? ĉu vi englutis vian langon ? Bone... jen larmoj nun ! ŝi pludiris kaj stariĝis ĵetante sian buŝtukon sur la tablon. Nu, mi preferas foriri ol vidi tiun vizaĝon fronte al mi, eta stultulino !

Ŝi eliris, fortege puŝante la pordon. Antoinette kaj la anglino restis solaj antaŭ la flankenmetita manĝilaro.

- Nu, finmanĝu vian deserton, Antoinette, flustris Miss. Vi neakurate alvenos vian kurson de la germana lingvo.

Per tremanta mano, Antoinette metis en sian buŝon la kvaronon de la oranĝo, kiun ŝi ĵus senŝeligis. Ŝi klopodis manĝi malrapide, kviete, por ke la domservisto, senmova malantaŭ ŝia seĝo, povu kredi ŝin indiferenta kontraŭ tiuj kriaĉoj, kaj malestimanta « tiun virinon ». Sed kontraŭvole, larmoj eliris el ŝiaj ŝvelaj palpebroj kaj fluis, rondaj kaj brilaj sur ŝian robon.

Iom poste, S-ino Kampf eniris la lernoĉambron ; ŝi enmane tenis la paketon de preparitaj invitokartoj :

- Post la manĝeto, vi iros al via pianokurso, Antoinette, ĉu? Vi transdonos la koverton kun invito al Izabela ; kaj, Miss, vi enpoŝtigos la reston.

- Yes, Mrs. Kampf.

La poŝtoŝtancelo estis plensŝtopita. Miss Betty rigardis, kioma horo estas :

- Ho, mankas al ni la tempo ! Estas malfrue. Mi iros al la poŝtoŝtancelo dum via kurso, karulino, ŝi diris, deturnante sian rigardon, kun siaj vangoj eĉ pli ruĝaj ol kutime : tio... tio estas al vi egala, karulino, ĉu ne?

- Jes, murmuris Antoinette.

Ŝi nenion plu diris. Sed kiam, konsilinte ke ŝi rapidu, Miss Betty estis ŝin lasinta antaŭ la domo, kie loĝas Izabela, Antoinette iom atendis. Kaŝiĝante en la embrazuro de la portalo, ŝi ekvidis la anglinon, kiu rapidiris al taksio haltigita ĉe la stratangulo. La aŭto preterpasis tuj apud Antoinette, kiu staris sur la pintoj de la piedoj por scivoleme sed timeme enrigardi. Sed ŝi vidis nenion. Dum momento ŝi restis senmova, okulsekvante la forirantan taksion.

« Mi ja opiniis, ke ŝi havas amanton... ili eble kisas unu la alian same kiel en la libroj... Ĉu li diras al ŝi « Mi amas vin... » ? Kaj kio pri ŝi ? ... Ĉu ŝi estas lia amorantino ? ŝi plu demandis al si, kun ia honto kaj fortega naŭzo miksitaj kun malklara sufero : libera, sola kun viro... kiel feliĉa ŝi estas ! ...Ili eble iros al la Bosko¹⁴. Mi dezirus, ke Panjo vidu ilin... Ha ! mi dezirus, ŝi murmuris pugnigante la manojn : tamen ne ! la amantoj havas feliĉon... ili estas feliĉaj, ili estas kune, ili kisas unu la alian... La tuta mondo enhavas multegajn virojn kaj virinojn, kiuj amas unu la alian... Kial ne mi ? »

Per streĉitaj brakoj, ŝi balancis antaŭ si sian tekono de lernantino. Ŝi malame rigardis ĝin, sopirĝemis, malrapide sin turnis sur la kalkanoj kaj trairis la korton. Ŝi malfruis. Fraŭlino Izabela diros : « Ĉu oni ne instruas al vi, ke akurateco estas la unua devo de bonedukita infano rilate al la instruistoj, Antoinette ? »

« Ŝi estas stulta, maljuna, malbela... » ŝi opiniis, kun kolero.

Laŭtvoĉe, ŝi eldiris :

« Bonan tagon, Fraŭlino ! Min malfruigis Panjo, mi ne kulpas ; kaj ŝi diris, ke mi transdonu tion al vi... »

Dum ŝi transdonis la koverton, ŝi aldonis pro subita inspiro : « ... kaj ŝi petis, ke vi lasu min foriri kvin minutojn pli frue ol kutime... »

Tiele, ŝi eble vidos Miss Betty-on reveni kun akompananto.

Sed Fraŭlino Izabela ne aŭskultis. Ŝi legis la invitkarton de S-ino Kampf.

- Kion ? Balon ? Ĉu via patrino aranĝos balon ?

Ŝi turnis kaj returnis la karton inter siaj fingroj, kaj ŝtele movis ĝin sur sian mandorson. Ĉu ĝi estis gravurita aŭ nur presita ? Estis prezdiferenco de almenaŭ kvardek frankoj... Tuj, ŝi tuŝe rekonis gravuron... Ŝi humore ŝultrumis. Tiuj gesinjoroj Kampf de ĉiam spertis frenezajn vantemon kaj malŝparemon. Iam, kiam Rosine laboris en la Banko de Parizo (kaj tio okazis antaŭ ne tiel longe, Dio mia !) ŝi elspezis sian tutan monatsalajron por tualetoj... ŝi surhavis tolaĵon el silko... ĉiusemajne novajn gantojn... Sed ŝi verŝajne vizitis amorrendevuejojn... nur tiaj virinoj havis feliĉon... La aliaj... ŝi amare murmuris :

- Via patrino ĉiam havis bonŝancon...

« Ŝi furiozas » Antoinette diris al si. Ŝi demandis kun malica grimaceto :

- Sed vi certe venos, ĉu ne ?

- Lasu min diri al vi, ke mi kiel eble plej klopodos iri ĉar mi vere deziras renkontiĝi kun via patrino, diris Fraŭlino Izabela. Sed aliflanke, mi ankoraŭ ne scias, ĉu mi povos... Geamikoj, la gepatroj de eta lernantino, la gesinjoroj Gros, Aristide Gros, la eks-asistantarestro, pri kiu via patro certe aŭdis... mi jam konas ilin de jaroj ! – ili invitis min al teatro, kaj mi sendube promesis, vi ja komprenas, ĉu ?.. Tamen, mi penos aranĝi tion, ŝi konkludis sen plua klarigo. Ĉiuokaze, diru al via patrino, ke mi ĝojos kaj plezure pasigos momenton kun ŝi...

- Bone, Fraŭlino.

- Do, ni eklaboru... Nu, sidiĝu...

Antaŭ la piano, Antoinette igis la pluŝan tabureton malrapide turni. Laŭmemore, ŝi povus desegni la makulojn kaj truojn de la teksaĵo... Ŝi komencis gamludi. Kun senĝoja diligenteco, ŝi fikse rigardis sur la kamenbreto flavfarbitan vazon, polvnigran interne... Neniam iu ajn floro... Kaj tiuj abomenindaj skatoletoj el konkaĵoj sur la bretoj !.. Kiel malbela kaj malĝoja estis tiu apartamenteto, kien oni trenis ŝin de jaroj !..

Dum Fraŭlino Izabela dispoziciis la partiturojn, ŝi ŝtelmovis la kapon direkte al la fenestro... (Estas certe belega vetero en la Bosko, krepuske, kun

tiuj senfoliaj arboj, vintre fajnaj sub tiu perlblanka ĉielo ...) Tri fojojn semajne, ĉiusemajne, de ses jaroj... Ĉu tio daŭros ĝis ŝia morto ?

- Antoinette, Antoinette ! Nu, kiel do vi metas la manojn ? Bonvolu rekomenci tion, mi petas... Ĉu al via patrino venos multaj homoj ? - Mi kredas, ke Panjo invitis ducent personojn...- Ha ! Ĉu ŝi opinias, ke estos sufiĉe da spaco ? Ŝi ne timas, ke tro varmos, ke oni estos tro kunpremiĝintaj, ĉu ? Ludu pli forte, Antoinette ! Via maldekstra mano estas tro mola, etulino!.. Tiun ĉi gamon nun, kaj poste la ekzercon numero dek ok en la tria kajero de Czerny¹⁵...

Gamoj, ekzercoj... dum monatoj post monatoj : « La Morto de Oze »¹⁶, « La Senparolaj Kantoj » de Mendelssohn, La Barkarolo el « La Fabeloj de Hoffmann »... Kaj sub ŝiaj streĉaj fingroj de lernantino, ĉio tio miksiĝis en ia senforma kaj brua kriegado...

Per volvita notkajero en la mano, Fraŭlino Izabela vigle signis takton.

- Kial do vi tiom premas la fingrojn sur la klavojn ? .. Staccato, staccato... Ne kredu, ke mi eble ne vidas, kiel vi uzas la ring - kaj et-fingrojn ! ... Ducent personojn, vi diris... Ĉiujn vi konas ? - Ne.

- Ĉu via patrino surmetos sian novan rozkoloran robon Premet¹⁷? - ...

- Kio pri vi ? Mi supozas, ke vi ĉeestos la balon... Vi estas ja sufiĉe altkreska !

- Mi ne scias, murmuris Antoinette kun dolora ekstremo.- Pli rapide, pli rapide !.. jen en kia ritmo tio estas ludenda... unu, du, unu, du, unu, du... Nu, ĉu vi dormas, Antoinette ? ... La sekvon, mia etulin'...

La sekvo... tiu fragmento kvazaŭ barita per diesoj, kie oni ĉiufoje stumblas... En la najbara apartamento ploras infaneto... Fraŭlino Izabela ŝaltis la lampon... Ekstere la ĉielo malheliĝis, forviŝiĝis... La pendolhorloĝo sonas kvarfoje... Jen unu plia horo perdita, dronita, kiu forfluis inter la fingroj kiel akvo kaj neniam plu revenos... « Mi dezirus foriri tre malproksimen aŭ morti... »

- Vi estas jam laca, Antoinette, ĉu ? Samaĝe, mi ludis ses horojn ĉiutage... Nu, iomete atendu, ne tiom rapidu, ne urĝas al vi... Je kioma horo mi devos veni la 15an ?

- Estas skribite sur la karto. Je la deka.
- Bonege. Sed mi revidos vin antaŭe...
- Jes, Fraŭlino...

Ekstere, la strato estis senhoma. Starante tuj kontraŭ la muro, Antoinette atendis. Post momento, ŝi rekonis la paŝon de Miss Betty, kiu rapidegis brako en brako kun viro. Ŝi antaŭen impetis kaj stumblis kvazaŭ en la kruoj de la paro. Miss Betty eliris krieton.

- Ho, Miss ! Jam mi atendas vin de longa kvaronhoro...

Preskaŭ sub la okuloj, ŝi fulmrapide ekvidis la vizaĝon de Miss tiel ŝanĝitan, ke ŝi haltis, kvazaŭ ŝi hezitus rekoni ĝin. Sed ŝi ne vidis la kompatindan etan buŝon malfermitan, vundetitan kvazaŭ nenatura floro ; ŝi avide rigardis « la viron ».

Li estis tre juna fraŭlo. Studento. Eble gimnaziano, kun tiaj delikataj lipoj doloraj post la unuaj razadoj... beletaj senhontaj okuloj... Li estis fumanta. Dum Miss balbute petis pardonojn, li kviete laŭtvoĉe diris :

- Prezentu min, kuzino mia.
- My cousin, Ann-toinette, flustris Miss Betty.

Antoinette manpremis. La fraŭlo iom ridis, silentis ; kaj li ŝajne pripensis kaj finfine proponis :

- Mi akompanu vin, ĉu ne ?

Ĉiuj tri silente iris laŭ la senhoma kaj nigra strateto. Kontraŭ la vizaĝo de Antoinette la vento pelis aeron malvarmetan, malsekan pro pluvo kaj malklaran kvazaŭ pro larmoj. Ŝi malrapidigis siajn paŝojn, rigardis la geamantojn, kiuj iris antaŭ ŝi, silentaj, premitaj unu kontraŭ la alia. Kiel rapide ili paŝadis !.. Ŝi haltis. Ili eĉ ne rigardis returne. « Se iu veturilo min renversus, ĉu ili almenaŭ aŭdus ? », ŝi pripensis kun stranga amareco. Iu pasanta viro koliziis kun ŝi ; ŝi timigite retromovis. Sed temis nur pri la lanternisto ; ŝi vidis kiel li tuŝis la stratlanternojn per sia longa stango, unu post la alia, kaj ili tuj eklumis en la nokto. Ĉiuj tiuj lumoj, kiuj trembrilis kaj flirtis, kiel kandeloj en la vento !.. Ŝi subite timis. Plenforte, ŝi antaŭen kuris.

La geamantojn ŝi reatingis antaŭ la ponto Aleksandro la III-a. Ili interparolis rapidege, tre mallaŭte, kun siaj vizaĝoj proksimaj. Ekvidante Antoinette-n, la fraŭlo malpacience gestis. Dum momento, Miss Betty konfuziĝis ; kaj, post subita inspiro, ŝi malfermis sian mansaketon kaj elŝovis la paketon da kovertoj.

- Prenu, karulino. Jen la invitkartoj de via patrino, kiujn mi ankoraŭ ne enpoŝtigis... Rapide kuru ĝis tiu eta tabakejo, tie, en la maldekstra strateto... Vi vidas ties lumon, ĉu ?.. Ĵetu ilin en la leterkeston. Ni atendos vin ĉi tie...

Ŝi ŝovis la preparitan paketon en la manon de Antoinette kaj haste malproksimiĝis. Antoinette vidis, ke ŝi haltas meze de la ponto ; poste, kun mallevita kapo, ŝi atendis la fraŭlon. Kaj ili apogis sin kontraŭ la parapeto.

Antoinette ne estis moviĝinta. Pro la mallumo, ŝi vidis nur du konfuzajn ombrojn, kaj ĉirkaŭe la Sejnon nigran kaj kovritan de rebriloj. Eĉ kiam ili kisis unu la alian, ŝi divenis pli ĝuste ol vidis la fleksiĝon, ian molan falon de ambaŭ vizaĝoj unu kontraŭ la alia ; sed ŝi subite premtordis la manojn kiel ĵaluza virino... Pro tiu movo, unu koverto eliris kaj terenfalas. Ŝi sentis timon kaj rapidege levprenis ĝin, sed, samtempe, ŝi hontis pri tiu timo : nu, kio ? ĉu ĉiam tremi kiel knabineto ? Ŝi ne meritis esti virino. Kaj tiuj du aliaj, kiuj daŭre reciproke kisas ! Ili eĉ ne disigis lipojn... Ŝin ekkaptis ia kapturino, ia sovaĝa bezono de spitado kaj malbono. Kun premitaj dentoj, ŝi ekprenis ĉiujn kovertojn kaj ĉifis ilin en siaj manoj ; ŝi disŝiris ilin kaj ĵetis ĉiujn kune en la Sejnon. Dum longa tempo, kun dilatita koro, ŝi rigardis ilin, kiuj flosis kontraŭ unu arkaĵo de la ponto. Kaj finfine la vento kunportis ilin en la akvon.

KVINA ĈAPITRO

Estis preskaŭ la sesa kiam Antoinette revenis de promenado kun Miss. Ĉar neniu respondis post kiam ili sonorigis, Miss Betty frapis je la pordo. Malantaŭ ĝi, ili aŭdis bruon de movitaj mebloj.

- Ili certe aranĝas la vestodeponejon, diris la anglino : jam ĉivespere okazos la balo. Tion mi daŭre forgesas ; ĉu ankaŭ vi, karulino ?

Ŝi ridetis al Antoinette per komplika mieno, samtempe timema kaj tenera. Tamen, ŝi ne revidis sian junan amoranton en la ĉeesto de la etulino. Sed ekde tiu lasta renkonto, Antoinette estis tiel senparolema, ke ŝi maltrankviligis Miss-on pro siaj silento kaj rigardoj...

La domservisto malfermis la pordon.

S-ino Kampf, kiu kontrolis la laboron de la elektristo en la apuda manĝoĉambro, tuj impetis :

- Ĉu vi ja ne povis eniri per la servista ŝtuparo ? ŝi furioze ekkriis. Vi ja bone vidas, ke ni preparas vestodeponejon en la antaŭĉambro ! Ni devas nun ĉion refari ; tio estos neniam finita ! ŝi pludiris, prenante unu tablon por helpi la pordiston kaj Georgon, kiuj estis aranĝantaj la ĉambron.

En la manĝoĉambro kaj la granda galerio, kiu plilongigis ĝin, ses servistoj en jakoj el blanka tolo dispoziciis la tablojn por la vespermanĝo. En la mezo, la bufedo estis provizita, kaj belege ornamita per brilkoloraj floroj.

Antoinette emis eniri sian dormoĉambron, sed S-ino Kampf denove ekkriis :

- Ne tien!.. ne iru tien ! Ĉe vi estas nun la trinkejo. Kaj Miss, ankaŭ via ĉambro estas bezonata : ĉinokte, vi dormos en la tolaĵejo. Kaj vi, Antoinette, en la eta formetejo... ĝi situas je la ekstremo de la apartamento ; vi povos dormi, eĉ ne aŭdos la muzikon... Kion vi faras ? ŝi demandis al la

elektristo kiu laboris senhaste kaj kantozumis... Vi ja vidas, ke tiu ampolo ne funkcias !...- He ! Oni bezonas tempon, sinjorin'...

Rosine kolere ŝultrumis :

« Tempon ! Tempon ! Jam de unu horo li laboradas... »

Parolante, ŝi vigle premis siajn manojn samgeste kiel ŝia filino, kiam tiu ĉi koleras. La knabino, senmova sur la sojlo, subite ekstremis, kiel persono, kiu neatendite staras antaŭ spegulo.

S-ino Kampf surhavis ĉambran robon kaj iris nudpiede en siaj pantofloj. Ŝiaj taŭzitaj haroj tordiĝis kiel serpentoj ĉirkaŭ ŝia brula vizaĝo. Ŝi ekvidis la floriston kun la brakoj plenaj je rozoj. Li klopodis pasi preter Antoinette, kiu estis apogita ĉe la muro :

- Pardonu, fraŭlino...

- Nu, puŝiĝu do ! ŝi tiel abrupte kriis, ke Antoinette retroirante kubutfrapetis la viron kaj senfoliigis unu rozon.

- Sed vi estas ja neeltenebla ! ŝi daŭris per tiel fortega voĉo, ke tintis la glasoj sur la tablo. Kion do vi faras ĉi tie, ŝovante vin tra la homojn kaj ĝenante ĉiujn ? Foriru ! Iru en vian ĉambron ! ... ne en vian ĉambron sed en la tolaĵejon aŭ ien ajn, kien vi volos ; sed ke oni ne vidu vin, kaj mi ne aŭdu vin !

Post la foriro de Antoinette, S-ino Kampf haste trairis la manĝoĉambron, la servistejon obstrukciitan de siteloj plenaj de glacieroj por glaciigi la ĉampanon, kaj eniris la studejon de sia edzo. Kampf estis telefonanta. Ŝi apenaŭ atendis ĝis kiam li malŝaltis la aŭskultilon kaj tuj ekkriis :

- Sed kion vi faras ? Vi eĉ ne estas razita !- Je la sesa ? Sed vi frenezas !

- Unue, estas la sesa kaj duono ; sekve, eble necesos pliaj aĉetaĵoj lastmomente. Preferinde ni estu pretaj.

- Vi frenezas, li senpacience rediris. Ni havas ja domservistojn por tiaj aĉetaĵoj...

- Plaĉas al mi kiam vi ekludas la aristokraton aŭ la grandan sinjoron, ŝi ŝultrumante diris. « Ni havas domservistojn... »; konservu do viajn belajn manierojn por viaj gastoj !

Kampf grumblis :

- Ho ! Ne komencu ekscitiĝi !..

- Sed kiel do, kriis Rosine kun larmoj en sia voĉo, kiel do mi ne ekscitiĝu ?!. Nenio glatas ! Neniam tiuj porkaj domservistoj estos pretaj ! Necesas, ke mi estu ĉie, ke mi pririgardu ĉion ; de tri noktoj, mi ne plu dormas ; mi estas elĉerpita ; mi sentas, ke mi freneziĝas...

Ŝi ekprenis cindruĵeton el arĝento kaj ĵetis ĝin teren. Tiu violento ŝajne kvietigis ŝin. Iom hontante, ŝi ridetis.

- Mi ne kulpas, Alfred...

Kampf skuis la kapon sen respondi. Kiam Rosine estis elironta, li revokis ŝin :

- Nu, aŭskultu. Mi dezirus demandi, ĉu vi ankoraŭ ne ricevis iun ajn respondon de niaj gastoj ?

- Ne. Kial ?

- Mi ne scias, sed tio ŝajnas al mi stranga... Kvazaŭ temus pri malagrabla koincido : dum mi volas demandi al Barthélemy, ĉu li bone ricevis la invitkarton, jam de unu semajno mi ne plu vidas lin ĉe la Borso... Ĉu mi telefonu lin ?

- Ĉu nun ? Estus stulte !

- Estas ja tamen strange, diris Kampf.

Lia edzino interrompis lin :

- Nu, estas ne konvene respondi, jen ĉio ! Oni venas aŭ ne... Kaj, ĉu vi volas koni mian opinion? Tio eĉ plaĉas al mi... Tio signifas, ke neniun antaŭvidis malplenumi la rendevuon kun ni... Ili estus almenaŭ pardonpetintaj, ĉu vi ne samopiniis ?

Ĉar ŝia edzo ne respondis, ŝi senpacience demandis :

- Ĉu ne, Alfred ? Mi ja pravas, ĉu ? Nu, kion vi elpensas ?

Kampf levis la brakojn.

- Nenion mi scias... Kion mi diru al vi ? ... Mi scias ne pli ol vi ...

Ili silente rigardis unu la alian. Rosine kapkline vespiris.

- Ho, Dio mia ! Oni sentas sin tiel konfuzita, ĉu ne ?- Tio baldaŭ finiĝos ...

- Mi ja scias, sed intertempe...Ho ! Se vi scius, kiom mi timas ! Mi volus, ke ĉio estus jam finita...

- Ne nervoziĝu, malvigle rediris Kampf.

Kun distrita mieno, li mem turnis papertranĉilon en siaj manoj. Li avertis :

- Precipe, parolu kiel eble malplej... per kliŝoj... « Mi estas feliĉa renkonti vin... Bonvolu trinki glason... Varmas, malvarmas... »- Plej terure estos fari la prezentadojn, zorgvoĉe diris Rosine... Imagu ĉiujn tiujn homojn, kiujn mi vidis nur unu fojon en mia tuta vivo ! Mi apenaŭ konas la vizaĝojn... Kaj ili ne konas unu la alian kaj havas nenion komunan inter si...

- Nu, Dio mia, vi balbutoj ion ajn. Fakte, ĉiuj estas en la sama situacio : kiel ni, ĉiuj iam komencis.

- Ĉu vi memoras nian etan apartamenton de la strato Favart ? ŝi subite demandis. Kaj kiel ni hezitis antaŭ ol anstataŭigi nian malnovan divanon tute eluzitan, kiu estis en nia manĝoĉambro ? Tio okazis antaŭ kvar jaroj, kaj rigardu nun ... ŝi plu diris, montrante ĉirkaŭ ilin la meblojn pezajn pro ties bronzo.- Vi volas diri, li demandis, ke, post kvar jaroj, ni gastos ambasadorojn, kaj tiam ni rememoros, ke ĉi-vespere ni estas tremantaj ĉi tie ĉar baldaŭ alvenos cento da bordelistoj kaj maljunaj diboĉulinoj ? Ĉu ?

Ridante, ŝi metis sian manon antaŭ lian buŝon.

- Nu, ja silentu !

Elirante, ŝi koliziis kun la ĉefkelnero, kiu venis atentigi ŝin pri la « moseroj »¹⁸ - tiuj ĉi ne estis liveritaj kune kun la ĉampano ; la kelnero opiniis, ke mankos ĝino por la kokteloj.

Rosine prenis la kapon inter siaj manoj.

- Nu ! Jen la klimakso ! ŝi ekkris. Ĉu ne antaŭe vi povis min avizi ? Kie mi ja eltrovos ĝinon en tiu horo ? Ĉiuj vendejoj estas fermitaj ! .. Kaj kio pri la moseroj ?..

- Sendu la ŝoforon, mia kara ! konsilis Kampf.- La ŝoforo foriris vespermanĝi, diris Georgo.- Kompreneble ! kolerege ekkriis Rosine.

Kompreneble ! Li ja fajfas pri... – ŝi korektis sin : tio estas al li egala ĉu oni bezonas lin aŭ ne, tiu sinjoro foriras, tiu sinjoro iras vespermanĝi ! Jen unu pli, kiun mi forĵetos ekde morgaŭ matene, ŝi pludiris al Georgo per voĉo tiel kolera, ke la servisto tuj premis siajn longajn razitajn lipojn.- Se la Sinjorino diras tion por mi... li ekrespondis.- Ne, mia amiko, ne, vi estas freneza... tiuj vortoj elglitis el mia buŝo ; vi ja vidas, ke mi estas ekscitita, diris Rosine ŝultrumante. Voku taksion kaj tuj iru al Nicolas¹⁹... Donu al li monon, Alfred...

Ŝi rapidegis al sia dormoĉambro, survoje restarigis florojn kaj riproĉadmonis la servistojn :

- Tiu ĉi plado da keksoj ne estas en la taŭga loko... Plu restarigu la voston de tiu fazano... Kie estas la sandviĉoj kun freŝa kaviaro ? Ne metu tiujn tro antaŭe : ĉiuj tuj formanĝus ilin. Kie estas la tortetoj kun grashepataĵo ? Mi vetas, ke oni forgesis la grashepataĵon ! Se mi ne zorgus pri ĉio...

- Sed ni estas elpakantaj tiujn, Sinjorino, interrompis la ĉefkelnero.

Li rigardis ŝin kun malkaŝa ironio.

« Mi certe aspektas ridinda » subite pripensis Rosine, kiam ŝi ekvidis en la spegulo sian purpurigitan vizaĝon, siajn delirajn okulojn, siajn tremantajn lipojn. Sed, kiel trostreĉita infano, ŝi sentis, ke ŝi malsukcesos kvietiĝi malgraŭ ĉiuj siaj streboj ; ŝi estis elĉerpita kaj ploronta.

Ŝi eniris sian ĉambron.

La ĉambristino ĵus aranĝis sur la liton la baltualeton, teksitan el arĝentfadeno kaj ornamitan per dikaj franĝoj el perloj, la ŝuojn, kiuj brilis kiel juveloj , kaj la ŝtrumpojn el muslino.

- Ĉu la Sinjorino tuj vespermanĝos ? Oni verŝajne servos la manĝon ĉi tie por ne malordigi la tablojn, ĉu ?...

- Mi ne malsatas, kolere diris Rosine.

- Laŭ via volo, Sinjorino. Sed ĉu mi mem rajtas finfine vespermanĝi ? demandis Lucia kaj premis la lipojn, ĉar laŭ la ordoj de S-ino Kampf, dum kvar horoj ŝi jam rekudris la perlojn de ŝia robo, kiuj elfadeniĝis laŭlonge de la franĝoj. Mi atentigus la Sinjorinon, ke jam estas preskaŭ la oka, kaj

homoj ne estas bestoj.- Sed iru do, fraŭlin' ! Iru ! Ĉu mi retenas vin ? ekkriis S-ino Kampf.

Kiam ŝi estis sola, ŝi ĵetis sin sur la divanon kaj fermis la okulojn. Sed la ĉambro estis malvarmega kiel kelo : ekde tiu mateno, la radiatoroj estis malŝaltitaj en la tuta apartamento. Ŝi stariĝis kaj alproksimiĝis al la tualetmeblo.

« Mi estas timinde malbela... »

Ŝi zorgeme ekŝminkis sian vizaĝon : unue, per dika tavolo da kremo, kiun ŝi knedis ambaŭmane ; poste per likva ruĝaĵo sur la vangojn ; nigraĵo sur la okulharojn ; la etaj delikataj linioj, kiuj plilongigis la palpebrojn ĝis la tempioj ; la pudro...

Ŝi ŝminkis sin ege malrapide kaj, de tempo al tempo, ŝi ĉesis, prenis la spegulon kaj avide observis sian bildon kun pasia kaj malkvieta zorgo, per rigardoj samtempe severaj, malfidemaj kaj ruzaj. Subite, inter siaj premitaj fingroj ŝi ekprenis unu blankan haron sur sia tempio ; ŝi eltiris ĝin kun granda grimaco. Ha ! La bonaj eventoj okazas en malĝusta momento de nia vivo!.. ŝia dudekjara vizaĝo... ŝiaj floraspektaj vangoj... kaj pec-ŝtopitaj ŝtrumpoj, flikitaj subvestoj... Kaj nuntempe la juveloj, la roboj, la unuaj sulkoj... ĉio tio iras kune... Dio mia ! kiel necesis rapidegi vivi, plaĉi al la viroj, ami... Mono, belaj tualetoj kaj belaj aŭtomobiloj : kial ĉio tio se en la vivo ne ekzistas iu viro, iu bela kaj juna amoranto ?.. Tiun amoranton... kiel longe ŝi jam atendis lin ! Ŝi estis aŭskultinta kaj sekvinta virojn, kiuj parolis al ŝi pri amo kiam ŝi estis ankoraŭ malriĉa knabino, ĉar ili estis bele vestitaj, havis belajn flegitajn manojn... Kiaj kruduloj, ĉiuj ili !.. Sed ŝi ne ĉesis daŭre atendi... Kaj nun estis ŝia lasta ŝanco, la lastaj jaroj antaŭ la maljuneco, la vera, nerebonigebla, neriparebla... Ŝi fermis la okulojn, imagis junajn lipojn, avidan kaj teneran rigardon plenan de deziroj ...

Haste, kvazaŭ ŝi kurus al amrendevuo, ŝi ĵetis sian negliĝon kaj ekvestiĝis. Ŝi surmetis siajn ŝtrumpojn, ŝuojn kaj robon, kun tia aparta lerteco de tiuj, kiuj la tutan vivon rezignis havi ĉambristinon. Da juveloj... ŝi havis plenan kofron !.. Laŭ Kampf, ili estas la plej senriskaj investadoj... Ŝi surmetis sian grandan kolieron kun du vicoj da perloj, ĉiujn siajn ringojn, kaj braceletojn kun grandegaj diamantoj, kiuj ĉirkaŭis ĉiun brakon de manradiko ĝis kubuto. Poste, ŝi alkroĉis al sia korsaĵo grandan pendjuvelon ornamitan per safiroj, rubenoj kaj smeraldoj. Ŝi brilegis, fulmetis kvazaŭ

relikvujo. Ŝi kelkpaŝe retroiris, rigardis sin kun ĝoja rideto... Finfine la vivo komenciĝis !.. Tiun ĉi vesperon, kiu scias ?..

SESA ĈAPITRO

Antoinette kaj Miss finis vespermanĝi sur gladotabulo, kiu kuŝis inter du seĝoj en la tolaĵejo. Malantaŭ la pordo, ili aŭdis la servistojn, kiuj rapidegis en la provizejon, kaj la bruon de ekfrapita teleraro. Antoinette ne moviĝis, kun la manoj premitaj inter la genuoj. Je la naŭa, Miss rigardis sian brakhorloĝon.

- Necesas ke vi tuj enlitiĝu, karulino... vi ne aŭdos la muzikon en la ĉambreto; vi bone dormos...

Ĉar Antoinette ne respondis, ŝi ridante interfrapis la manojn.

- Nu, vekiĝu, Antoinette ! Kio okazas al vi ?

Ŝi gvidis ŝin al eta formetejo, malbone lumigita, kiun oni haste mebligis per lito el fero kaj du seĝoj.

Vidalvide, sur la alia flanko de la korto, vidiĝis la brilegaj fenestroj de la salono kaj manĝoĉambro.

- De ĉi tie vi povos vidi la dancantojn; ne estas ŝutroj, ŝerce diris Miss Betty.

Post kiam ŝi estis foririnta, Antoinette timeme kaj avida apogis sian frunton kontraŭ la vitrojn; unu granda murflanko estis tute iluminita de la orbrila heleco de la fenestroj. Ombroj kure pasis malantaŭ la kurtenoj el tulo : domservistoj. Iu malfermetis fenestron; Antoinette distingeble aŭdis la sonojn de la instrumentoj, kiujn oni agordis en la fundo de la salono. Jam ĉeestis la muzikistoj... Dio mia ! Estis post la naŭa !... La tutan semajnon, ŝi konfuze atendis ian katastrofon, kiu enabismigus la mondon ĝustatempe por ke nenio estu malkovrita; sed tiu vespero pasis same kiel ĉiu vespero. En iu najbara apartamento horloĝo sonis la duonon. Ankoraŭ tridek minutojn, tri kvaronhorojn kaj... Nenio ! Sendube nenio okazos ĉar, kiam ili rehejmeniĝis tiun tagon post la promenado, impetante al Miss S-ino Kampf demandis kun sia kutima vigleco, kiu tuj perdis la saĝon al nervozuloj : « Nu ! Ĉu vi enpoŝtigis la invitkartojn ? Ĉu estas certe, ke vi nenion perdis, nenion

mislokis ? » kaj ĉar Miss respondis : « Jes, S-ino Kampf ! » certe ŝi sola estis respondeca, nur ŝi... Kaj se ili maldungos ŝin, ne gravas ! Tion ŝi meritas; tiele ŝi scios...

« Pri tio mi fajfas, mi fajfas ! » ŝi balbutis. Ŝi kolere mordis siajn manojn, kiuj sangis sub la junaj akraj dentoj.

« Kaj la alia povos fari al mi, kion ŝi volos... Mi ne timas, mi fajfas pri tio... »

Ŝi rigardis la malheliĝintan profundan korton sub la fenestro.

« Mi mortigos min, kaj antaŭ ol morti, mi diros, ke pri tio ŝi kulpas, jen ĉio ! ŝi murmuris. Mi timas nenion, mi jam antaŭvenĝis min ... »

Ŝi denove ekgvatis; la vitro vaporkovriĝis sub ŝiaj lipoj; ŝi refoje apogis sian vizaĝon kontraŭ la vitron, kiun ŝi vigle frotis. Finfine, malpacience, ŝi larĝe malfermis la fenestron. La nokto estis sennuba kaj malvarma. Nun, per siaj akraj okuloj de dekvinjaraĝulino, ŝi klare vidis la seĝojn vicigitajn laŭlonge de la muro kaj la muzikistojn ĉirkaŭ la piano. Ŝi restis senmova tiel longe, ke ŝi ne sentis plu siajn vangojn nek brakojn nudajn. Dum momento, pro tiel forta halucino, ŝi ekpensis, ke nenio okazis; ke en sonĝo ŝi vidis la ponton, la nigran akvon de la Sejno, la disŝiritajn kartojn, kiuj flugis en la vento; ke la invititoj tuj alvenos kvazaŭ mirakle kaj la festo komenciĝos. Ŝi aŭdis soni la kvaronhoron antaŭ la deka kaj poste la dek batojn... La dek batojn... Tiam ŝi ektremis kaj elŝovigis sin el la ĉambro. Ŝi paŝis al la salono, kiel sensperta kaŝmurdanto, kiun allogas la loko de lia krimo. Ŝi transiris la koridoron, kie du servistoj, kun la kapo klinita malantaŭen, trinkis ĉampanon el la boteloj mem. Ŝi eniris la manĝoĉambron. Ĝi estis senhoma, tutpreta kaj ornamita, meze kun granda tablo kovrita per ĉasaĵo, fiŝaĵo en ĝelateniĵo, ostroj en pladoj el arĝento, kaj ornamita per punto el Venecio, per floroj, kiuj interligis la telerojn, kaj per du similaj piramidoj da fruktoj. Ĉie ĉirkaŭe, sur la unupiedaj tabletoj, kvar aŭ ses manĝilaroj brilis per siaj kristalo, delikata porcelano, arĝento kaj orarĝento. Pli poste, Antoinette neniam povis kompreni kiel ŝi aŭdacis tiele trairi, laŭ ĝia tuta longo, tiun grandegan ĉambron brilege lumigitan. Sur la sojlo de la salono, ŝi iomete hezitis kaj poste ekvidis en la apuda buduario la grandan divanon; ŝi genuiĝis kaj enŝoviĝis inter la dorsapogilo de la meblo kaj la pendants drapiraĵo; estis nur eta loko, kie ŝi povos resti premante kontraŭ si brakojn kaj genuojn; kaj ŝovante la kapon antaŭen, ŝi vidis la

salonon kvazaŭ ĝi estus teatroscenejo. Ŝi ankoraŭ frostotremetis pro sia longa restado antaŭ la malfermita fenestro. Nuntempe, la apartamento ŝajnis dormanta, kvietita, silenta. La muzikistoj parolis mallaŭtvoĉe. Ŝi vidis nigrulon kun brilaj dentoj, virinon en robo el silko, cimbalojn kiel tiuj sur tamburego en foira festo, gigantan violonĉelon stare en angulo. Unge tuŝetante ian gitaron, kiu zumis kaj obtuze ĝemis, la nigrulo vespiris :

- Oni komencas kaj finas pli kaj pli malfrue, nuntempe.

La pianisto diris kelkajn vortojn, kiujn Antoinette ne aŭdis, kaj kiuj ridigis la aliajn. Kaj subite eniris S-ro kaj S-ino Kampf.

Kiam Antoinette ekvidis ilin, ŝi moviĝis, kvazaŭ ŝi enŝoviĝus en la teron; ŝi premegis sin kontraŭ la muron, kun la buŝo enkaŝita en la kavo de sia refaldita kubuto; sed ŝi aŭdis iliajn alproksimiĝantajn paŝojn. Ili estis tuj apud ŝi. Kampf sidiĝis sur brakseĝon fronte al Antoinette. Rosine dum momento paŝis en la ĉambro; ŝi ŝaltis kaj malŝaltis la murlampojn de la kameno. Ŝi brilegis pro siaj diamantoj.

- Sidiĝu, mallaŭte diris Kampf; estas stulte tiom moviĝadi...

En sia kaŝejo, Antoinette malfermis la okulojn kaj antaŭŝovis la kapon ĝis vange tuŝi la divanlignon; tiam ŝi vidis sian patrinon starantan antaŭ ŝi. Kortuŝis ŝin la esprimo, kiun ŝi neniam vidis sur ŝia severa vizaĝo : ian humilecon, fervoron, timegon...

- Alfred, ĉu vi opinias, ke tio estos bona ? ŝi demandis per pura kaj tremeta voĉo de knabineto.

Alfred eĉ ne havis tempon por respondi al ŝi ĉar la sonorilo subite ekvibris tra la apartamento.

Rosine kunigis la manojn.

- Ho ! Dio mia ! Jen tio ekas ! ŝi flustris, kvazaŭ temus pri tertremo.

Ambaŭ impetis al la salonpordo, kies klapoj estis larĝe malfermitaj.

Post momento, Antoinette vidis ilin reveni flanke de Izabela, kiu tre laŭte parolis, per voĉo ankaŭ malsimila, nekutima, alta kaj akresona, kun etaj ekridoj, kiuj pikis ŝiajn frazojn kvazaŭ plumtufoj.

« Ho ! Mi forgesis tiun ĉi alian ! », ŝi pensis kun timego.

Nun ĝojradia, S-ino Kampf senĉese parolis ; ŝi retrovis sian pretendeman kaj feliĉan mienon. Ŝi petole okulsignis al sia edzo, ŝtelmontrante al li la flavan robon el tulo de Fraŭlino Izabela, kaj ĉirkaŭ ŝia longa maldika kolo, la boan el plumoj, kiun ŝi fuŝpalpadis per ambaŭ manoj kvazaŭ la ventumilo de Célimène²⁰. Nazpinĉa lorneto el arĝento pendis el ekstremaĵo de rubando el oranĝkolora veluro ĉe ŝia manartiko.

- Ĉu vi ne konis tiun ĉambron, Izabela ?- Ne ! Ĝi estas vere beleta ; kiu mebligis ĝin por vi ? Ho ! tiuj ĉi etaj porcelanvazoj estas ĉarmaj ! Nu, ĉu daŭre plaĉas al vi tiu japana stilo, Rosine ? Mi ĉiam pravigas ĝin ; ankoraŭ la lastan fojon, al la Bloch-Levy, la Salomon, vi certe konas ilin, ĉu ne ? .. kiuj, riproĉis ke tiu stilo estas straso kaj aspektas « de novriĉulo » (laŭ ilia dirmaniero), mi diris :

« Vi povas aserti kion vi volas, sed tio estas gaja, viva, kaj se ĝi malpli kostas ol la Ludviko XV, ekzemple, tio ne estas difekto, tute male... »- Sed vi tute eraras, Izabela, tre vigle protestis Rosine. Antikvaj ĉinaĵoj aŭ japanaj freneze multekostas !.. Tiel, ĉi tiu porcelanvazo kun birdoj...

- De ekfiniĝanta epoko...

- Por tio, mia edzo pagis dekmil frankojn ĉe la Hôtel Drouot²¹ ... Sed, kion mi diris ? ne dekmil sed dekdu mil frankojn, ĉu ne, Alfred ? Ho, mi admonis lin, sed ne longe ; mi mem ŝategas serĉesplori, aĉeti bagatelaĵojn, tio estas mia pasio.

Kampf sonorigis al servisto :

- Vi ja trinkos glason da portovino, ĉu ne, Sinjorinoj ? Alportu tri glasojn da portovino Sandeman, kaj sandviĉojn , kaviarsandviĉojn... , li diris al Georgo, kiu ĵus eniris.

Ĉar Fraŭlino Izabela iom malproksimiĝis por esplori per sia lorneto origitan Budaon sur kuseno el veluro, S-ino Kampf rapide flustris :

- Sandviĉojn ! sed vi freneziĝas ! Vi ne malaranĝu mian tutan tablon nur por ŝi ! Georgo, vi alportu keksojn en la korbo el porcelano de Saksio, nepre en tiu korbo, ĉu vi bone aŭdis ? - Jes, Sinjorino.

Post momento, li revenis kun la pleto kaj la eta karafo el kristalo de Baccarat. La triopo silente trinkis. Kaj S-ino Kampf kaj F-ino Izabela sidiĝis sur la kanapo, malantaŭ kiu sin kaŝis Antoinette. Antaŭŝovante la

manon, ŝi povus tuŝi la arĝentajn ŝuojn de sia patrino kaj la balŝuojn el flava sateno de sia instruistino. Kampf ire kaj reire paŝis kun ŝtelrigardoj al la pendhorloĝo.

- Nu, diru al mi, kiujn ni vidos ĉi vespere ? demandis F-ino Izabela.- Ho ! respondis Rosine, kelkajn ĉarmajn personojn, ankaŭ kelkajn oldulojn, kiel la maljuna markizino de San Palacio, al kiu mi devas reciproki la inviton. Sed ŝi tiom ŝatas veni ĉi tien... Mi vidis ŝin hieraŭ, ŝi devis foriri kaj ŝi diris al mi : « Mia kara, mi prokrastis de unu semajno mian foriron al suda Francio pro via dancvespero : oni tiel multe amuziĝas ĉe vi... »

- Ha ! Ĉu vi jam organizis balojn ? demandis F-ino Izabela kun premitaj lipoj.

- Ne, ne, haste respondis S-ino Kampf, nur tekunvenojn. Mi ne invitis vin, ĉar mi scias, ke vi estas tre okupata dum la tago...- Jes, prave ; fakte, mi intencas ludi en koncertoj venontan jaron...- Ĉu vere ? ... Sed jen bonega ideo !

Ili silentis. F-ino Izabela denove observis la murojn de la ĉambro.

- Tio estas ĉarma, tutĉarma... Bona gusto...

Denove estis silento. La du virinoj tusetis. Rosine glatigis siajn harojn. F-ino Izabela zorgeme aranĝis sian jupon.

- Kian belan veteron ni havis dum la lastaj tagoj, ĉu ne ?

Kampf abrupte interparolis :

- Nu ! Ni ne plu restos kun krucitaj brakoj, ĉu ? Tamen, kiel malfrue alvenas la homoj ! Vi ja skribis je la deka horo sur viajn kartojn, ĉu ne, Rosine ?

- Mi komprenas, ke mi alvenis tre antaŭtempe.- Ne, kara ! Kion vi diras ? Jen terura kutimo alveni tiom malfrue, tio estas bedaŭrinda...

- Mi proponas, ke ni ekdancu, diris Kampf gajeme kunfrapante siajn manojn.

- Sed kompreneble ! Jen tre bona ideo ! Vi ekludu ĉarlestonon, kriis S-ino Kampf al la orkestro.

- Ĉu vi dancas ĉarlestonon, Izabela ?

- Jes, iomete, same kiel ĉiuj...

- Nu, ne mankos al vi dancontojn. Ekzemple : la markizo de Icharra, unu nevo de la ambasadoro de Hispanio ; li gajnas ĉiujn premiojn en Deauville, ĉu ne Rosine ? Dum la atendo, ni malfermu la balon.

Ili malproksimiĝis kaj la orkestro ekmuĝis en la senhoma salono. Antoinette vidis, ke S-ino Kampf stariĝis, rapidiris al la fenestro kaj apogis (ankaŭ ŝi ! pensis Antoinette) sian vizaĝon kontraŭ la malvarmaj vitroj. La horloĝo sonis la dekan kaj duonon.

- Dio mia ! Dio mia ! Sed kion do ili faras ? flustris S-ino Kampf maltrankvile. La diablo foriru kun tiu olda frenezulino ! ŝi plu diris preskaŭ laŭtvoĉe, kaj tuj samtempe ŝi aplaŭdis kaj ridante kriis :- Ha ! Ĉarme ! Ĉarme ! Mi ne sciis, ke vi tiele dancas, Izabela !- Sed ŝi dancas kiel Joséphine Baker²², respondis Kampf el la fundo de la salono.

Kiam la danco finiĝis, Kampf vokis sian edzinon :

- Rosine, mi tuj iros al la bufedo kun Izabela ; ne estu ĵaluza !- Sed ĉu vi mem ne venos kun ni, karulino ?- Bonvolu iom atendi. Post kelkaj ordonoj al miaj servistoj, mi rekuniĝos kun vi...

- Mi amindumos kun Izabela dum la tuta vespero, ja sciu Rosine !

S-ino Kampf trovis la forton por ridi kaj ilin fingre minaci ; sed ŝi ne diris iun vorton, kaj tuj kiam ŝi estis sola, ŝi denove haste revenis kontraŭ la fenestro. Oni aŭdis la aŭtomobilojn, kiuj veturis laŭ la avenuo ; kelkaj el ili malakcelis antaŭ la domo ; tiam S-ino Kampf kliniĝis kaj avide rigardis la nigran vintran nokton, sed la aŭtoj malproksimiĝis, la motorbruo mallaŭtiĝis kaj perdiĝis en la ombro. Krom tio, samtempe kiel malfruiĝis, la aŭtoj fariĝis pli kaj pli raraj, kaj dum longaj minutoj, oni ne plu aŭdis iun ajn sonon sur la senhoma avenuo, same kiel en la provinco²³ - nur la bruon de la tramveturilo en la apuda strato, kaj lontanajn dampitajn huposonojn, malfortigitajn pro la distanco...

La dentoj de Rosine klakis, kvazaŭ ŝi havus febron. Kvarono antaŭ la dekunua. Dek minutoj antaŭ la dekunua. En la senhoma salono, eta horloĝo sonis per rapidaj batetoj de tinta sonoro vigla kaj klara; tiu de la manĝoĉambro respondis, insistis, kaj de la alia stratoflanko, granda horloĝo

ĉe la frontono de preĝejo malrapide kaj surde batis, pli kaj pli forte laŭmezure kiel pasis la tempo.

- Naŭ, dek, dekunu, kriis S-ino Kampf kun despero, levante al la ĉielo siajn brakojn plenajn de diamantoj. Nu, kio ? Sed kio ja okazis, mia dolĉa Jesuo ?

Alfred revenis kun Izabela. La triopo silente rigardis unu la alian.

S-ino Kampf nerve ridis :

- Tio estas iom stranga, ĉu ne ? Nur, ke nenio grava okazu...- Ho, mia karulino, krom se okazus tertremo, diris Izabela per triumfa tono.

Sed S-ino Kampf ankoraŭ ne kapitulacis. Ŝi diris, ludante kun siaj perloj, sed per voĉo angore raŭkigita :

- Ho, tio signifas nenion; imagu, ke iam mi estis ĉe mia amikino la Grafino de Brunelleschi : la unuaj invititoj komencis alveni je kvarono antaŭ noktomezo. Tial...

- Tio estas ja malagrabla kaj nervoziga por la dommastrino, dolĉe flustris Izabela.

- Ho, jen ... jen kutimo, kiun oni ja devas akcepti, ĉu ne ?

Ĝuste tiam, eksonis la sonorilo. Alfred kaj Rosine impetis al la pordo.

- Ludu, kriis Rosine al la muzikistoj.

Ili vigle ekludis bluson. Neniu envenis. Rosine ne kapablis plu rezisti. Ŝi vokis :

- Georgo ! Georgo ! Ĉu vi ne aŭdis, ke oni sonorigis ? - Iu el la vendejo Rey ĵus alportis la glaciaĵojn.

S-ino Kampf ekkriegis :

- Mi asertas al vi, ke ja okazis io : akcidento, miskompreno, eraro pri la dato aŭ horo, mi ja ne scias kio ! Dek post la dekunua ! Estas nun dek post la dekunua ! ŝi malespere rediris.- Jam dek post la dekunua ? ekkriis F-ino Izabela. Sed vi ja tute pravas; kiel rapide pasas la tempo ĉe vi, gratulon... Estas eĉ la kvarono, mi opinias, ĉu vi aŭdas soni ?

- Nu, post ne longe ili alvenos, fortvoĉe diris Kampf.

Denove la triopo sidiĝis; sed ili ne plu parolis. Oni aŭdis la servistojn, kiuj ridegis en la servistejo.

- Iru por ilin silentigi, Alfred, fine diris Rosine per voĉo kolertremanta. Nu, iru !

Je la dekunua kaj duono eniris la pianisto.- Ĉu necesos plu atendi, Sinjorino ?

- Ne ! foriru, ĉiuj vi foriru ! subite ekkriis Rosine, kiu ŝajnis kvazaŭ ŝi estus rulonta sin sur la tero pro nerva atako. Ni tuj pagos vin, kaj foriru ! Ne okazos balo ! Okazos nenio ! Tio estas ofendo, insulto, antaŭaranĝita fiaĵo de malamikoj por ridindigi nin, por mortigi min ! Se iu ajn alvenas nun, mi ne volas vidi lin, ĉu vi aŭdis ? ŝi plu diris kun kreskanta violento. Vi diros, ke mi foriris, ke estas malsanulo en la domo, aŭ mortinto, laŭ via volo!

F-ino Izabela serveme hastis :

- Nu, karulino, ne ĉiuj esperoj malaperis. Ne tiele vin turmentu aŭ vi malsaniĝos.

Evidente, mi komprenas, kion vi certe sentas, mia kara, mia kompatinda amikino; sed ve ! la mondo estas tiom malbona !.. Alfred, ion vi eble diru al ŝi; dorlotu kaj konsolu ŝin...

- Kia komedio ! prifajfis Kampf tra la dentoj, kun palega vizaĝo. Ĉu vi finfine silentu ?

- Nu, Alfred, bonvolu ne krei, sed male dorlotu ŝin...- He ! Kion mi faru, se al ŝi plaĉas esti ridinda ?

Li subite turnis sin sur la kalkanoj kaj abrupte alparolis la muzikistojn :

- Kion do vi ankoraŭ faras ĉi tie ? Kiom ni ŝuldas al vi ? Kaj foriru tuj poste, je Dio !..

F-ino Izabela malrapide levprenis siajn boaron el plumoj, nazpinĉan lorneton kaj mansaketon.

- Estus pli dece, ke mi lasu vin, Alfred, krom se mi povas iel ajn helpi, mia kompatinda amiko...

Ĉar li nenion respondis, ŝi kliniĝis, kisis la frunton de Rosine, kiu restis senmova, eĉ ne ploris, kun la okuloj fiksaj kaj sekaj :

- Adiaŭ, mia karulino. KREDU, ke mi estas ja malespera, ke mi plej kore kompatas, ŝi flustris aŭtomate, kvazaŭ en tombejo. Ne ! ne rekonduku min, Alfred, mi lasas vin, mi foriras, mi estas foririnta... Ploru laŭ via plaĉo, mia kompatinda amikino, tio mildigas ! ŝi plenvoĉe plu kriis meze de la senhoma salono.

Dum ŝi trairis la manĝoĉambron, Alfred kaj Rosine aŭdis, ke ŝi diras al la servistoj :

- Precipe, ne faru ian bruon ; la Sinjorino estas tre ekscitita, tre afliktita.

Kaj finfine, aŭdiĝis la liftozumado kaj la surda ekbato de la malfermata kaj refermata pordego.

- Kia virinaĉo ! murmuris Kampf. Se almenaŭ ŝi...

Li ne finis sian frazon. Rosine, abrupte stariĝinte, kun fluo da larmoj sur la vizaĝo, pugnominacis lin ekkriante :

- Stultulo, vi mem kulpas ! Pro via aĉa vantemo, via orgoljo de pavo ! Ĉio tio okazas pro vi !.. La Sinjoro volas organizi balojn ! Inviti ! Ne, tio estas morte ridinda ! Sed Diable ! Ĉu vi opinias, ke la homoj ne scias, kiu vi estas nek de kie vi venas ? Novriĉulo ! Nu, ili ja prifajfis vin; viaj amikoj, viaj bonaj amikoj, tiuj ŝteluloj kaj friponoj !- Kio pri la viaj ? viaj grafoj, markizoj, prostituistoj !..

Ili kune daŭre kriis ŝprucadon da koleregaj kaj violentaj paroloj, kiuj fluis kvazaŭ torento. Poste, tra premitaj dentoj, Kampf diris pli mallaŭte :

- Kiam mi akceptis vin, jam vi vagadis Dio scias kien ! Ĉu vi kredas, ke mi nenion scias, ke mi nenion komprenis ? Mi opiniis tiam, ke vi estas beleta, inteligenta ; kaj se mi riĉiĝos, vi honorigos min... Mi ja bone trafis : sen ia dubo, jen bona negoco ! Kun manieroj de krudulino; oldulino kun manieroj de kuiristino... - Aliuloj kontentiĝis je tio...

- Pri tio mi ne dubas ! Sed ne diru al mi la detalojn ĉar morgaŭ vi bedaŭrus tion...

- Morgaŭ ? Ĉu vi opinias, ke mi restos kun vi unu horon plu, post ĉio, kion vi diris al mi ? Krudulo !

- Foriru ! For al Diablo !

Li mem eliris klakante la pordon.

Rosine vokis :

- Alfred, revenu !

Kaj, anhelante, ŝi atendis, kun la kapo turnita direkte al la salono ; sed li estis jam malproksime... Li malsupreniris la ŝtuparon. Sur la strato, lia kolerega voĉo kriis dum momento : « Taksio ! Taksio !.. », poste ĝi malproksimiĝis kaj malaperis ĉe iu stratangulo.

La domservistoj estis suprenirintaj, lasinte ĉie la lampojn ŝaltitaj kaj la pordojn malfermitaj... En sia brila robo kaj siaj perloj, Rosine daŭre restis senmova, funde falinta en fotelo.

Abrupte, ŝi faris ekkoleran movon, tiom viglan kaj subitan, ke Antoinette ektremis kaj, retroŝovante, frapis al si la frunton kontraŭ la muron. Tremante, ŝi kaŝkaŭris plu; sed ŝia patrino estis aŭdinta nenion. Ŝi eltiris nun siajn brakringojn unu post la alia kaj ĵetis ilin teren. Unu el ili, bela kaj peza, tute ornamita per grandegaj diamantoj, ruliĝis sub la kanapon, ĉe la piedoj de Antoinette. Kvazaŭ najlita sur sia loko, Antoinette rigardis.

Ŝi vidis la vizaĝon de sia patrino, kie fluis larmoj miksiĝantaj kun la ŝminko. Tiu vizaĝo estis faldita, grimacanta, purpurigita, infana, komika... kortuŝa. Sed Antoinette ne estis kortuŝita; ŝi sentis nenion krom ia malŝato, malestima indiferenco. Pli poste, ŝi diros al iu viro : « Ho, sciu ! Mi estis terura knabino ! Imagu, ke iam... » Ŝi subite eksentis sin riĉa de sia tuta estonteco, de ĉiuj siaj junaj sendifektaj fortoj, kaj ankaŭ ĉar ŝi povis pensi : « Kiel do oni povas tiele plori, pro nur tio ?.. Kaj kio pri amo ? kaj morto ?.. Ŝi iam mortos... ĉu tion ŝi forgesis ? »

Ĉu ankaŭ la kreskuloj ja suferas pro tiuj bagatelaj kaj nedaŭraj aferoj ? Kaj ŝi, Antoinette, estis timinta ilin, estis treminta fronte al ili, iliaj krioj, koleroj, vanaj kaj sensencaj minacoj !.. Malrapide, ŝi elŝoviĝis el sia kaŝejo. Dum plia momento, vualita de la ombro, ŝi rigardis sian patrinon, kiu ne plorsingultis sed daŭre restis tute buliĝinta, dum neviŝitaj larmoj fluis ĝis ŝia buŝo. Tiam Antoinette stariĝis kaj alproksimiĝis.

- Panjo.

S-ino Kampf neatendite eksaltis sur sia seĝo.

- Kion vi volas ? Kion vi faras ĉi tie ? ŝi nervoze ekkriis. Foriru ! Tuj foriru ! Lasu min !

Nuntempe, eĉ ne unu minuton, mi povas esti kvieta en la propra domo !

Iom pala, Antoinette ne moviĝis, kun la kapo al la tero. Tiuj laŭtvoĉaj ekkrioj sonis en ŝiaj oreloj, sed feblaj kaj senigitaj je ilia forteco, kvazaŭ teatra tondro. Iun tagon, ŝi diros al iu viro : « Panjo ekkrios, sed ne gravas... »

Ŝi dolĉe antaŭŝovis la manon, metis ĝin sur la harojn de sia patrino, karesis ilin per malpezaj fingroj iom tremantaj.

- Mia kompatinda panjo...

Dum momento, Rosine aŭtomate plu baraktis, forpelis ŝin, skuis sian konvulsitan vizaĝon :

- Lasu min ! Foriru ! Ja lasu min !..

Kaj malforta, venkita, kompatinda esprimo ekaperis sur ŝiaj trajtoj :

- Ha, mia kompatinda filino, mia kompatinda eta Antoinette ! Vi estas ja feliĉa. Vi ankoraŭ ne scias, kiom maljusta, malbona, nefidinda estas la mondo... tiuj homoj, kiuj ridetis al mi, kiuj invitis min, ili mokis min malantaŭ mia dorso, ili malestimis min ĉar mi ne apartenas al ilia mondo ; amasoj da aĉuloj, da ... sed vi ne povas kompreni, mia kompatinda filino ! Kaj via patro !.. Ha ! Ja nur vin mi havas! .. ŝi abrupte findiris, nur vin mi havas, mia kompatinda filineto !..

Ŝi ekprenis ŝin en la brakojn. Dum, kontraŭ ŝiajn perlojn, ŝi premis la silentan etan vizaĝon, ŝi ne vidis, ke ĝi ridetis. Ŝi diris :

- Vi estas bona filino, Antoinette...

Tio estis la sekundo, la nekaptebla ekfulmo, kiam « sur la vivovojo » ili kruciĝis, kaj unu estis suprenironta dum la alia estis enprofundiĝonta en la ombron. Sed tion ili ne sciis. Dume Antoinette dolĉe ripetis :

- Mia kompatinda panjo...

(Parizo, 1928)

FINO

Piednotoj



1) What shall I do when you'll be gone away?

Kion mi faros, kiam vi estos foririnta ?

2) How can you!

Kiel vi povas (fari tion) !

3) Andrea Spirelli, Elena kaj Maria

Personoj en la romano « Il Piacere » (1889) de Gabriele d'Annunzio.

4) Julien de Suberceaux, Maud de Rouvres

Personoj en la romano « Les demi-vierges » (1924) de Armand du Plessy. NB : La nomo "Kampf " signifas "batalo" en la germana.

5) Rue Favart

En Parizo (2a distrikto)

6) Feuer

Fajro (en la germana)

7) Opéra-Comique (Salle Favart)

Spektaklohalo por teatraĵoj kaj koncertoj.

8) Bois de Boulogne

(Bosko de Boulogne) vasta parko de Parizo, famkonata pro la nokta ĉeesto de prostituitinoj.

9) Avenue Hoche

Avenuo de Parizo, kiu direktas al la Triumfa Arko.

10) Nico, Deauville, Chamonix

Nico: grava turisma urbo ĉe Bordo Lazura.

Deauville : fama banloka urbo en Normandio.

Chamonix : vintrostacio je la piedo de la Mont Blanc (Alpoj).

11) Poirier Birnbaum

Poirier (franca) = Birnbaum (germana) : pirarbo, pirujo.

12) What's the matter with you, child? Are you ill?

Kio okazas al vi, infano ? Ĉu vi estas malsana ?

13) Oh dear!

Dio mia !

14) La Bosko

Le Bois de Boulogne

15) Czerny

Pianisto kaj fama pedagogo http://eo.wikipedia.org/wiki/Carl_Czerny.

16) Morto de Oze

El la muzika suito Peer Gynt de Edvard Grieg

http://eo.wikipedia.org/wiki/Peer_Gynt

17) Robo Premet

Robo Premet kun antaŭa drapiraĵo (1927)



Longaj roboj revenas laŭmode en Parizo.
Kompreneble ili ankoraŭ ne estas longaj ĉiuflanke.
Tiu ĉi simple havas longan antaŭan faldon, kiu
ŝajne daŭrigas la drapiraĵon de la korsaĵo kaj falas
sufiĉe malsupren. Tiu tre gracia robo estas el
helrozkolora sateno kun buko el straso ĉetalie.

18) Mosero

Tre eta kirlilo, kiun oni turnmovis en la ĉampano por forigi ties
aerveziketojn, kiuj - laŭ iuj virinoj- okazigis misdigeston.

19) Nicolas

Pariza vendejo specialigita pri vinoj (ekde 1822).

20) Célimène

Verŝajne temas pri la dancistino en la filmo « Das Spielzeug von Paris » - en la franca « Célimène, la Poupée (=Pupo) de Montmartre » de Michael Curtiz (1925).

21) Hôtel Drouot

La ĉefa aŭkciejo en Parizo.

22) Joséphine Baker

Fama kantistino, aktorino kaj dancistino. Vestita nur per banana jupo, ŝi dancis ĉarlestonon en Parizo en 1925 (poste ŝi fariĝis stelulino de « Folies Bergère ») eo.wikipedia.org/wiki/Josephine_Baker

23) La provinco

Cetero de la lando, kontraste kun la ĉefurbo.